

Burundo: pri elefantoj kaj herbejoj

31a jarkolekto - aŭgusto/septembro 2011/08-09

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Irlando: malamikoj ne plu

Tuberkulozo:
danĝera malamiko revenas

Litovio:
la plej granda tragedio

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amouroux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentreje. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Eldonjaro: 2009

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 430 paĝoj,
ISBN: 978-90-77066-38-6;
prezo ĉe FEL: 24 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 14,40 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Irlando: malamikoj ne plu

8



FOTO DE LA KOVRILO: COPYRIGHT: DBMIF.NET

Dum preskaŭ la tuta historio de la moderna Irlando, naciistoj kutimis aludi al Britio kiel „la antikva malamiko”. Certe, ekde la fondiĝo de la sendependa irlanda ŝtato, la rilatoj inter la du najbaraj landoj estis jen maltrankvilaj, jen tiklaj, jen malamikegaj, sed maksimume, malvarme diplomatecaj.

politiko

IRLANDO	8
Malamikoj ne plu	
INTERNACIAJ RILATOJ	9
Festo-neĉeesto	
ĈAMERIO	9
Malpermeso pro deveno	
MINORITATOJ	10
Martela jeso, amboŝa neo	

moderna vivo

INTERŜTATAJ KONTAKTOJ	11
Estonio instruas Belgion	
ARTO	11
Luma akuŝo	
ESEO	12
Kiom da homoj, tiom da gustoj	
EKSA JUGOSLAVIO	13
Antaŭ 30 jaroj	
LITERATURO	13
Kvarone Sabate	
IRLANDO	14
Plej optimisma popolo	
LITOVIO	15
La plej granda tragedio	
IRLANDO	15
Kverkoj kaj kuzoj	
JUNULARO	16
Ĉiam pli malalten	

HEJMOJ	17
Kovriloj, kurtenoj – ĉiakoloraj	
BURUNDO	18
Pri elefantoj kaj herbejoj	
HANSA LIGO	19
Bruas la mezepoko	
AŬSTRIO	19
Jen la tub-ero	
AGROKULTURO	20
Kampara fabrikado	
AŬTOMOBILADO	21
Tamtamas ŝtopiĝoj	
AŬSTRIO	21
Vilaĝo ĉine ĉarma	

ekonomio

ENERGIO	22
Revoj pri skistogaso	
KOSOVO	23
Facilas investi	

scienco

TUBERKULOZO	24
Danĝera malamiko revenas	

turismo

ĈINIO	26
Ŝnurveturi	

spirita vivo

TEOLOGIO	27
Mikaelo Serveto (1511-1553) 500-jara	

libroj

Fonto de beletro	28
Klara kaj amuza haŝio	28
Lirika politika pamfleto	29
Inter videbleco kaj nevidebleco.....	30
REAGO	32
Senmita biografio de Zamenhof (2)	

eseo

Unu tago de iu persono	33
------------------------------	----

rakonto

Matena kafo	35
-------------------	----

> Abonoj	4
> Enkonduko	5
> Leteroj.....	6
> El mia vidpunkto.....	7
> Anoncetoj.....	39

> Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

> Tarifoj

Ŝtato de la paganto	surface	MONATO		LA JARO aere		
		aere	rete	3a klaso	1a klaso	
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Greĥio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

> aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albura Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba
- > **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi
- > **Francja:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
- > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya , Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanz, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanz@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
- > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250,

- Escazú. Reto: miaumiau@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gdewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugalia:** Portugalia Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
- > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
- > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
- > **Slovenaj:**
- > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
- > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Ŝtopiĝoj

De preskaŭ 20 jaroj MONATO havas redaktantaron, konsistantan el unu ĉefredaktoro (nun Paul Gubbins) kaj el pli ol dek fakaj redaktoroj, el kiuj ĉiu respondecas pri aparta rubriko, ekzemple pri politiko, pri ekonomio, pri scienco ktp. Tiuj inter vi, kiuj regule sendas tekstojn por publikigo en MONATO, scias, ke ĉiu redaktoro havas sian apartan retadreson facile memoreblan, kiel *politiko@monato.net*, *arto@monato.net* aŭ *ekonomio@monato.net*. La manuskriptoj por publikigo senditaj al unu el tiuj adresoj alvenas do ne en la eldonejo de MONATO en Antverpeno, sed rekte ĉe la koncerna redaktoro, ie ajn en la mondo.

Tiu sistemo havas avantaĝojn: tekstoj kaj fotoj venas tuj ĉe la ĝusta homo, kaj ili ne povas perdiĝi inter la centoj da administraj leteroj, kiuj alvenas en la eldonejo. Sed ĝi havas ankaŭ malavantaĝeton. Multaj el niaj kunlaborantoj estas scivolaj, ĉu ilia

manuskripto bone alvenis, ĉu ĝi aperos en la tuj venonta numero ktp. Kien skribi por akiri tiujn informojn? Al la redaktoro kun tiu bela *@monato.net*-adreso? Aŭ al la eldonejo en Antverpeno? Por eviti ke oni entute devu cerbumi pri tio, la ĉefredaktoro antaŭ nelonge petis, ke ĉiuj redaktoroj tuj konfirmu la alvenon de manuskripto, tiel ke la aŭtoro povas esti certa, ke ĝi ne perdiĝis.

Tamen niaj aŭtoroj ne nur estas scivolaj, multaj el ili estas senpaciencaj (!) kaj do deziregas tuj scii, en kiu numero de MONATO aperos la produkto de ilia cerbostreĉo. Kaj jen demando, kiun neniu povas respondi. Artikoloj, kiuj traktas aktualan temon (tiaj aperas ofte en la rubriko „Politiko“), havas prioritaton. Se estas multaj tiaj prioritataj manuskriptoj en unu difinita monato, tiuj kiuj ne traktas ion aktualan (ekzemple novelo, turisma artikolo), povas prokrastiĝi, kaj tiaj fojfoje aperas plurajn monatojn post



kiam la aŭtoro sendis ilin. Pro tio en tiaj „neaktualaj“ rubrikaj kelkfoje estas ŝtopiĝoj kaj tie kontribuoj eventuale nur guton post gutu aperadas.

Por malgrandigi la ŝtopiĝojn MONATO regalas vin ĉi-monate per escepte dika numero kun multe da politiko kaj moderna vivo, kun rakonto, kun librorecenzoj ktp! Ĝuu ĝin!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

socialj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: http://flandra_esperanto-ligo.ipernity.com

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- Arto: Claude Nourmont-Moon, 2 Om

Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellan-gasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schalliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg

Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Krys Williams, 95 Tynybedw Terrace, Treorci, RCT CF42 6RL, Britio. Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porze-llangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Stilo nete supera

Mi ĉerpas donitaĵojn por miaj kontribuoj precipe el la flandraj komunikiloj. Mia unua provo estis traduki tekston el la nederlanda, kiun mi opiniis interesa. Sed mi rapide rezignis kaj komprenis, ke mi devas mem redakti la enhavon, ĉar mi konfrontiĝis kun nenecesaj ripetoj, superfluaĵoj, miskomprenblaj frazoj kaj eĉ iel manko de logiko en la enhavo. Por kompreni konfuzan tekstoparton, mi devis konsulti alian fonton pri la sama temo. Tiajn redakciajn mankojn mi poste retrovis eĉ en la plej prestiĝaj flandraj gazetoj kaj magazinoj.

Post kiam mi sendas miajn tekstojn al Paul Gubbins, mi kutime retrovas ilin iom modifitaj en la reta kaj en la presita versioj de MONATO. Kun plezuro mi konstatas, ke la redaktoro ankoraŭ sukcesas poluri ilin per elimino de superfluaĵoj, per pli klaraj esprimoj kaj eĉ foje per reordigo de paragrafo por akiri pli logikan kaj koheran enhavon. Mia simpla konkludo estas, ke la stilo de MONATO nete superas tiun de

la flandraj komunikiloj. Mi scivolas, ĉu alilandaj kontribuantoj havas similajn spertojn.

Ivo Durwael
Belgio

Lingvoj malaperos plu

Mi estas preta subskribi ĉiun vorton en la artikolo de Garvan Makaj *Ĉu gravas, se lingvoj mortas?* (MONATO 2011/5, p. 25-26). Tiu problemo emocias min jam dum multaj jaroj. Kaj post longaj pripensoj trudas sin nur unu konkludo: lingvoj ankaŭ plu malaperos po unu dusemajne, neniu tion haltigos.

Certe, hipoteze oni povus fari multon. Eta popolo (ekzemple 1000 homoj) povus malfermi lernejon, eldoni gazeton, traduki la plej bonajn librojn por infanoj. Se la popolo estas ankoraŭ pli eta (kelkaj dekoj da homoj), oni devus urĝe organizi ekspedicion de lingvistoj, priskribi gramatikon kaj leksikon de la lingvo, registri ankoraŭ konserviĝintajn fabelojn, kantojn, proverbojn ... Sed kiu por tio donos la

monon?

Estas bezonataj ŝtata politiko kaj mono. En Israelo oni povis ja revivigi la lingvon, kiu dum 3000 jaroj estis morta. Kaj Makaj skribas, ke la gaela lingvo estas endanĝerigita. Kial? Ĉu la riĉa Britio ne havas monon por ĝia savado? Ĝi havas. Sed forestas deziro de ŝtatestoj. Tial lingvoj malaperos plu, kaj ni povas nur silente malgaji.

Miĥail Korotkov
Rusio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.

Lingvo aŭto-didakta

Paul GUBBINS

Jam de jaroj mi luktas kun fremda lingvo. Mi ne parolas pri mia gepatra, la angla, kvankam ties ortografio kaj prononcado de tempo al tempo min – metafore – ĉirkaŭ la kapo bategas, nepre venkante.

Do ne pri la angla lingvo temas, kvankam ja pri brita. Lingvo, kiun mi ĉiutage renkontas, ĝenerale en skriba formo, sed foje ankaŭ en parola. Lingvo, kiu min fojfoje amuzas, sed pli ofte, pro mia nescio, iritas, kolerigas. Temas pri la sekreta lingvo de aŭtoj. Aŭ, pli precize, de aŭto-ciferplatoj.

En Britio, kiel en kelkaj aliaj landoj, eblas – kontraŭ krompago – registri veturilon kun t.n. privata ciferplato. Tio signifas, ke oni anstataŭigas la ŝtate provizitajn ciferojn kaj literojn per memelektitaj, do personaj. Ekzemple, se mi estus fanfaronema riĉegulo mi povus, almenaŭ teorie, alfiksi sur mian veturilon platon PPG 1 (laŭ miaj inicialoj).

Fakte kreskis tuta industrio ĉirkaŭ personigitaj ciferplatoj. Se oni posedus, hazarde, personigeblan platon, oni povus vendi ĝin kaj tiel profiti – foje, se alfiksitan al malnova aŭto, kontraŭ pli da mono ol la valoro de la veturilo mem. Kaj, reciproke, abundas en Britio vantuloj pretaj akiri platojn, kies litero- kaj cifero-kombinaĵo – almenaŭ teorie – identigas la posedanton de la koncerna veturilo.

Tamen, almenaŭ al mi, tiuj ĉi identigiloj restis apenaŭ deĉifreblaj. Imagu do mian ĝojon, kiam, hazarde trafo- liumante bulvardan gazeton, mi trovis duonpaĝan reklaman ĝuste pri personaj platoj. Jen, mi kriis, la ŝlosilo al tiu ĉi mistera lingvo. Do mi eklegis, ekstudis kun entuziasmo.

Kelkaj kombinaĵoj, mi konstatis, facile deĉifreblas. Ekzemple AUS 721A literumas Austria (Aŭstrio): 7 kaj 2 fariĝas ... nu ... T kaj R. Klare, ĉu

ne? Simile AUB 123Y kreas la nomon Aubrey ... nu, jes, ĉi-foje 12 fariĝas R kaj 3 egalas al E. Tute logike.

Krome, se mi konus iun, kiu nomiĝas Mary, tiu povus aĉeti platon MAR 7S. Bone ... 7 fariĝas Y (kompreneble) kaj la fina S ... nu ... malaperas. Tre oportune – kaj mi forgesu, ke en supre menciita specimeno 7 egalas al T. Kaj kio pri DA61 ESS? Jen Dagless ... evidente, 6 fariĝas G kaj 1 L. Mi ne menciis, ke Dagless tre strange sonas: neniu Dagless-oj sin kaŝas en mia loka telefonlibro. Sed eble ie. Ho, kaj 6 signifas ankaŭ C: OFF 16E literumas office (oficejo). Bona identigilo, eble, por tiu, kiu tiom ŝoforas, ke la aŭto fariĝas oficejo.

Klare, la cifero 1 egalas al la litero L. Ho, jes, kaj 11 al ... nu ... H, L M, N kaj U. Ĉu vi ne kredas? Do vidu: NA11 EEM Naheem; WO11 ARD Wollard; LA11 DEN Lamden; LEO 11A Leona; kaj WA11 DBY Waudby. Denove ne troveblas Waudby-oj en la telefonlibro. Mi havas la impreson, ke oni inventas nomojn simple per la haveblaj literoj. Speco de alfabeto ludo, eble.

Sed ĉu nun vi komprenas, kial mi, ŝoforante, misorientiĝas en tiu ĉi bizara lingvo – eĉ pli mallogika ol la angla? Verdire, pasiginte tutan matenon, studante la diverajn kombinaĵojn kaj ties „solvojn”, mi povas konkludi nur, ke, kiel la angla, la reguloj tro komplikas por esti analizitaj, kaj ke litero aŭ cifero povas egale signifi pli malpliaton, kion vi volas, ke ĝi signifas.

Sed, ve ... mi konfesu. Ankaŭ mi ludis ĉi tiun alfabetan aŭto-ludon. Antaŭ unu jaro, kiam mia kara benzino-kapa filo, Rikardo, atingis sian 30an jaron, familianoj kune donacis al li delonge sopiratan personigitan ciferplaton. Iasence ni havis bonŝancon: ni akiris rekoneblan, sufiĉe trafan kaj, surprize, ne obscene multtekostan pla-

ton: R1 GUB. Li fieras pri sia identigilo kaj, supozeble, neniu rompos al si la cerbon por eltrovi kaŝitan nomon.

Do, se ĉi-someron vi vizitos Brition, kaj rimarkos R1 GUB kun ĝia ŝoforo, nepre salutu lin. Tamen bonvolu ne diri, ke lia patro taksas tiujn, kiuj personigas siajn aŭtojn, ne siajn vivojn, arogantaj, vantaj, havantaj pli da mono ol senco. Filo restas ja filo, eĉ se ties ideoj ne ĉiam kongruas kun tiuj de la patro.

Se ĉi-somere vi turisme aŭtas, ĉu en Britio aŭ alilande, ŝoforu sekure. Kaj, super ĉio, ĝuu la (nordduonsferan) someron.

Ho, se hazarde viaj kolegoj nomas vin porko-vizaĝulo, la bulvarda gazeto havas – senblage – personigitan platon por vi: P16 FAC – angle *pig face*. Kiu povus rezisti oferton tian? ■



FRANK MERLA

Malamikoj ne plu

Dum preskaŭ la tuta historio de la moderna Irlando, naciistoj kutimis aludi al Britio kiel „la antikva malamiko”. Certe, ekde la fondiĝo de la sendependa irlanda ŝtato, la rilatoj inter la du najbaraj landoj estis jen maltrankvilaj, jen tiklaj, jen malamikegaj, sed maksimume, malvarme diplomatecaj.

En Irlando la 20a jarcento estis pli ŝtorma, sanga kaj kruela, ol trankvila kaj „normala”, kvankam estis kelkaj mallongaj periodoj de relativa paco. Respublikanoj precipe malamis la britajn regantojn kaj la pretendojn de la britaj gereĝoj pri posedo de Nord-Irlando.

Eksplodo

En 1979 en haveno en la okcidenta Irlando ekstremistoj lasis bombon en fiŝboato, kiu apartenis al la grafo Louis Mountbatten [lui maŭntbétŋ], kuzo de Princo Philip [filip], la edzo de la brita reĝino. La eksplodo mortigis Mountbatten, heroon de la dua mondomilito, kaj amanton de Irlando, kie li plurfoje feriiis.

Tio ne estis la unua, nek la sola, kroupegaĵo pri kiu kulpis jen irlandanoj, jen britoj, en tiu malĝoja epoko. Ekzemple en la mateno de la 21a de novembro 1920, la tiel nomata Irlanda Respublikisma Armeo (IRA) mortigis 12 britajn sekretajn agentojn. Kiel reprezalio, en la sama tago, anoj de la Reĝa Polico en Irlando (RIC) mortpafis 14 civilulojn spektantajn gaelan sportmatĉon. En la vespero tri IRA-malliberuloj estis batmortigitaj de gardistoj.

Teroristoj

La 17an de majo 1974 en diversaj lokoj en Dublino kaj en la sud-irlanda urbo Monaghan [monaĥan], bomboj

metitaj en aŭtomobiloj (laŭraporte fare de nord-irlandaj porbritaj „lojalaj” teroristoj) mortigis 33 civilulojn kaj vundis preskaŭ 300 aliajn.

La 15an de aŭgusto 1998 bombo lasita de la respublikisma terorisma organizaĵo IRA eksplodis en la nord-irlanda urbo Omagh [oma], mortigante 29 homojn kaj vundante proksimume 220. Tiel, dum tiu terura periodo, okazis multegaj reciprokaj venĝaj atencoj, masakroj, murdoj kaj punatakoj. Samtempe pluraj kuraĝuloj klopodis trovi rimedojn por krei pacon en la Verda Insulo. Inter ili estis nord- kaj sud-irlandaj politikistoj, klerikoj kaj politikistoj irlandaj kaj britaj.

Iniciato

Du elstaraj inaj prezidantoj de la

Irlanda Respubliko, nome Mary [mejri] Robinson kaj Mary McAleese [makalis], hercule laboris por restarigi pacon, antaŭenigi amikecon inter la du partoj de la insulo kaj plibonigi la rilatojn inter Irlando kaj Britio. Tiacele prezidanto McAleese decidis aŭdacan iniciaton: ŝi invitis la britan reĝinon Elizabeth, regantinon de la „antikva malamiko”, fari formalan, tiel nomatan ŝtatan viziton al la respubliko.

De la 17a ĝis la 20a de majo efektiviĝis tiu historia vizito, malgraŭ objetoj de kelkaj naciistoj kaj de multaj homoj, kiuj timis pri la sekureco de la reĝino kaj de la publiko. Je sia alveno, Reĝino Elizabeth kune kun sia edzo Princo Philip Mountbatten ricevis varman bonvenigon de McAleese kaj aliaj irlandaj eminentuloj.



La vizito povas esti rigardata kiel simbolo de la fino de miskompreno, suspekto, kaj malvarmaj rilatoj inter la du najbaraj landoj.

Sonorilo

Post akcepto en la prezidantejo, la reĝino plantis arbon en la tiea ĝardeno, kaj du junaj gastoj, knabo el suda Irlando, knabo el norda, sonigis simblan sonorilon. Pro sekureco malmultaj irlandanoj povis vidi deproksime la reĝan vizitantinon, sed tiuj, kiuj ricevis la rajton, entuziasme aplaudis ŝin. Surstrataj protestoj estis malgrandaj, kaj neniu grava damaĝo estis kaŭzita.

La itinero kaj programo aranĝitaj por la reĝino enhavis kelkajn eksterordinarajn elementojn. La plej elstara kaj admirata estis vizito farita de la reĝino al ĝardeno en la centro de Dublino, memore al tiuj, kiuj mortis en ribelo kaj la sendependiga milito, fakte batalantoj kontraŭ la armeo de la tiama brita reĝo.

Omaĝo

La irlanda popolo estis profunde tuŝita, kiam la reĝino metis laŭran girlandon kaj klinis la kapon antaŭ la monumento. La publiko akceptis tian geston de reakordigo kaj omaĝo al la irlandaj patriotoj kiel grandaniman kaj noblan simbolon. La sekvan tagon la reĝino faris similan omaĝon al la miloj da irlandaj soldatoj mortintaj en la du mondomilitoj.

Okaze de oficiala bankedo la reĝino faris mallongan sed imponan oratoradon, en kiu ŝi esprimis profundan bedaŭron pro la tragikaj okazintaĵoj dum la longa malpaco en Irlando. La aŭskultantojn aparte ravis, ke ŝi enkondukis sian paroladon per kelkaj perfekte prononcataj vortoj en la gaela lingvo. Samevente deklaris la irlanda prezidanto: „Ni ne povas ŝanĝi la pasintecon, sed ni elektis ŝanĝi la estontecon.”

La vizito povas esti rigardata kiel simbolo de la fino de miskompreno, suspekto, kaj malvarmaj rilatoj inter la du najbaraj landoj. Koincide, dum la vizito, mortis je la aĝo de 85 jaroj (samaĝa kiel la reĝino) la amata eksĉefministro Garrett Fitzgerald [garat ficĝerald], unu el la homoj, kiu plej kontribuis al la brita-irlanda interkonsento, kiu kondukis al la tiel nomata irlanda pac-procezo kaj, espereble, al daŭra amikeco.

Garvan MAKAJ

INTERNACIAJ RILATOJ

Festo-neĉeesto

Komence de junio italoj festis la 150-jariĝon de sia respubliko. Invititaj estis ŝtatestroj el diversaj landoj, inkluzive de la prezidanto de Serbio, Boris Tadić.

Tamen ne invitita estis la prezidanto de Kosovo, Atifete Jahjaga. Laŭ Adem Demaçi, kosova politikisto, Italio – ŝtato kun grandaj investaĵoj en Serbio – ne invitis la kosovan prezidanton, kiam Tadić minacis ne ĉeesti, se ankaŭ ĉeestos Jahjaga. Tial mankis

reprezentanto de la plej nova eŭropa ŝtato, aspiranta aliĝi al EU.

Kvin membroj de EU (Rumanio, Hispanio, Grekio, Slovakio kaj Kipro) ankoraŭ ne agnoskas la sendependecon de Kosovo. Aliflanke oni faras plejblon por alproksimigi Serbion al EU, malgraŭ ĝia pasinteco. Tiucele oni utiligas ankaŭ la tro malfruan areston de la serba militkrimulo Ratko Mladić.

Bardhyl Selimi

ĈAMERIO

Malpermeso pro deveno

Albanoj povas libere moviĝi tra eŭropaj ŝtatoj apartenantaj al la tielnomata Ŝengen-zono, inkluzive de la najbara Grekio. Tamen la grekaj landlimaj gardistoj ne permesas liberan moviĝon al homoj devenantaj de Ĉamerio, en la nord-okcidenta Grekio.



Albanlingva lernejo en la urbo Filat, en Ĉamerio, dum la jaroj 1942-1944.

Jenas la preteksto: oni notas en pasporto naskiĝlokojn kun nomoj ne plu laŭleĝe uzataj de la greka ŝtato. Temas pri urboj kaj vilaĝoj en Ĉamerio, kiuj alinomiĝis kaj ne plu uzas siajn iamajn albansencajn nomojn. La albana ministro pri eksteraj aferoj protestis al la greka registaro.

Genocido

Ĉamerio estis iam loĝata de albanetnuloj apartenantaj kaj al la kristana kaj al la islama religioj. Kiam Grekio aneksis la regionon en 1913, okazis etnopurigado kaj genocido. En 1944 oni mortigis kelkmilojn da albanoj kaj forpelis preskaŭ ĉiujn islamajn albanojn el Grekio.

Nuntempe la parlamenta partio albana luktas por reakiri perditajn rajtojn rilate Ĉamerion, por ke homoj reiru al siaj prapatraj teroj kaj reposedu riĉaĵojn tie lasitajn.

Bardhyl Selimi

Martela jeso, ambosa neo

La ĉefa politika kaj ankaŭ cetere uzata vorto en Aŭstrio estas *jain*, kombinaĵo de *ja* (jes) kaj *nein* (ne).

Tia la sorto de la kontraŭtabakfuma leĝo, pri kiu neniu plu scias, ĉu oni rajtas, aŭ kie, fumi en publikaj ejoj. Tia same la sorto de la slovena minoritato en la suda provinco de Aŭstrio, Karintio.

Ĉio pivotas ĉirkaŭ respondeco pri la slovena minoritato en Karintio. Tio estas ekskluzive ŝtata afero. Aliflanke ĉiuj kancelieroj uzis la saman taktikon: „Aranĝu vi karintianoj tion inter vi – kaj poste sekvos la ŝtata leĝo, kiu tion jure fiksos”.

Vojo

Ke ĉe la ŝtato, ne ĉe la provinco, kuŝas respondeco, emas „forgesi” slovenoj, kiuj negocas kun provincaj aŭtoritatoj, kiuj jure havas neniun ligon kaj kompetenton pri la afero. Tiun ĉi falsan vojon uzas ankaŭ la najbara ŝtato Slovenio, kiu samtiel subtable negocas kun la provinco, anstataŭ uzi la preskribitan oficialan kaj leĝan vojon al Vieno.

La sola aŭstra institucio, kiu respektas la juran situacion koncerne la slovenan minoritaton, estas la alta ŝtata kortumo, kiu jam dum jaroj promulgas jurajn decidojn pri la devo de la ŝtato koncerne slovenojn en Karintio, speciale, pri starigo de dulingvaj indiktabuloj en la dulingvaj lokoj konkorde al la ŝtata traktato el la jaro 1955.

Tiu traktato, kiu prezentas la fundamenton de la ŝtatekzisto mem de Aŭstrio kaj la definitivon foriron de la okupaciaj fortoj (Usono, Britio, Francio kaj Sovetio), difinas en sia artikolo n-ro 7 la specialajn rajtojn de slovenoj en Karintio kaj Stirio kaj de kroatoj en Burglando.



La nova prezidanto de la plej forta slovena organizaĵo, Valentin Inzko.

Traktato

Temas do simple pri plenumo de tiu kondiĉo, kiu estas la esenca parto de devoj, por ke Aŭstrio estu internacie rekonita kiel suverena memstara lando. Tiu, kiu bremsas aŭ eĉ sisteme malebligas plenan efektivigon de tiu artikolo en la ŝtata traktato, subfosas la fundamenton de la aŭstra suvereneco.

Oni povas observi, ke ĉiuj aŭstraj kancelieroj, ĉu dekstraj ĉu maldekstraj, ĝis nun faris ĝuste tion ĉi. Kaj ili ĉiuj uzis la saman malnoblan trukon – ili delegis sian taskon al la provincaj aŭtoritatoj, kiuj ne intencas la problemon juste solvi, eĉ se ili laŭleĝe kaj laŭkonstitucie respondecas.

Fundamento

Tiel oni havas du negocantajn grupojn, kiuj ĉiu de sia flanko malrespektas la fundamenton de aŭstra suvereneco. La provincaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj provas, se ne rekte nuligi, tamen laŭeble prokrasti la solvon, ĝis la nombro de slovenoj falus tiel forte, ke la devo fakte ne plu ekzistus.

Sed ankaŭ slovenoj kaj iliaj tri organizaĵoj finfine faras la samon, ĉar ili unuflanke ĉiam referencas artikolon 7 kaj tuj poste mem ĝin nuligas, negocante kun la aŭtoritatoj, kiuj pri la afero tute ne havas komision.

Reprezentanto

La nova prezidanto de la plej forta slovena organizaĵo, Valentin Inzko, cetere diplomato kaj la alta reprezentanto de UN kaj EU por Bosnio kaj Hercegovino, subite troviĝis inter martelo kaj amboso – martelo de fojfoje ekstremecaj personoj en propra organizaĵo, kiuj ne scias diferencigi inter la aferoj laŭleĝe plenumendaj kaj aferoj dezirindaj, sed ne leĝe nepraj, kaj amboso de siaj provincaj negocpartneroj de la germanlingva flanko.

Fine oni subskribis kompromison pri 164 starigendaj indiktabuloj ambaŭlingvaj kaj pri financa subteno de slovenaj infanvartejoj kaj muziklernejoj.

Tamen la province reganta liberaleca partio la tutan kompromison relativigis per sia postulo, ke ĉion ĉi la popolo devus voĉdone konfirmi, kvankam tio ne estas en akordo kun la konstitucio.

Fumi en Aŭstrio aŭ uzi sian gepatran lingvon publike estas solvite laŭ la sama senprincipo kaj malhonesta kodvorto *jain* ...

Vinko OŠLAK

INTERŜTATAJ KONTAKTOJ

Estonio instruas Belgion

En marto ĉi-jara pli ol 140 000 estonoj voĉdonis, ne forlasinte sian domon. Estonio estas pioniro en la uzado de Interreto por oficialaj celoj kaj verŝajne la sola ŝtato, en kiu eblas voĉdoni rete. La belga ĉefministro Yves Leterme [iv leterme] vojaĝis al la estona ĉefurbo Talino por lerni.

En Estonio 90 % de la civitanoj plenigas sian impostoformularon interrete kaj 25 % voĉdonas hejme per sia komputilo. Kaj belgoj kaj estonoj posedas elektronikan identekarton. Tamen nur estonoj uzas tiun karton ankaŭ por voĉdoni. Ili povas tion fari dum dek tagoj, kaj ne nur dum kelkaj horoj, kiel en la belgaj balotadoj. Krome ili povas, se ili tion deziras, ankoraŭ ŝanĝi sian voĉon ene de tiu periodo.

Facile ricevi impostojn

Yves Leterme petis informojn ankaŭ pri la imposta sistemo. En Belgio ŝtatano, kiu devas ricevi parton de la tropagita imposto, devas atendi plurajn monatojn, antaŭ ol li ricevos sian monon, eĉ se li plenigas sian impostoformularon interrete. Estono tamen – tiel diras la ministro – ricevas ĝin ene de kvin tagoj post

la plenigo.

Malgraŭ la entuziasmo pri la estona sistemo Leterme restas iom skeptika. „Flandroj kaj valonoj ne tiel facilanime fidus novaĵojn”, li diris. Estos bezonata multe da tempo por konvinki ilin, ke eblas fidiinde voĉdoni kaj ke ne estas riske sciigi siajn en- kaj el-spezojn per Interreto.

pp



La belga ĉefministro Yves Leterme faris studvojaĝon al Estonio.



ARTO

Luma akuŝo



PAUL PEBERETS

Sur la placo Sint-Veerle en Gento la stratolanternoj nun lumiĝas, kiam en iu akuŝejo de la flandra grandurbo estas naskita infano. Tiu ĉi artaĵo de la italo Alberto Garutti estos unu el la altiraĵoj de *Track*, grandskala urbekspozicio, kiu okazos en Gento post unu jaro.

„La koncepto estas sufiĉe simpla,” prilumas la urba skabeno pri kulturo Lieven Decaluwe [live dekáliŭe], „en ĉiu akuŝĉambro de la urbo estas speciala butono, kiun oni premas tuj post la naskiĝo. Tiu aŭtomate lumigas la lanternojn. Per la artaĵo *Ai Nati Oggi* (Al tiuj, kiuj naskiĝis hodiaŭ) Garutti kaj la urbo volas, ke la naskiĝo de ĉiu gentano estu pli ol nura statistikero.”

pp

ESEO

Kiom da homoj, tiom da gustoj

Malgraŭ aferoj, kiuj unuigas Eŭropon, ekzemple la eŭro, persistas esencaj diferencoj, kiujn oni ne povas ignori. Unu el ili estas la maniero prezenti al la spektantaro filmon eksterlande turnitan (plejofte anglalingvan).

Kiu loĝis eĉ dum mallonga periodo ekzemple en Italio, Francio, Germanio aŭ Hispanio, tre bone scias, ke pro diversaj, kaj precipe kulturaj, kialoj memkompreneblas, ke ĉio estas dublita. Ne kulpas nur ŝovinismo kaj naciismo. Kaj ne ĉiam veras, ke oni dublas filmojn por montri, ke la propra lingvo estas supera al la ceteraj. Dublado simple igas filmon pli komprenebla kaj ĝuebla.

Temas cetere pri proceso pli malfacila ol oni imagas. Estas necese traduki kaj retraduki la eldiraĵojn antaŭ ol atingi rezulton kontentigan el ĉiuj vidpunktoj, ĉefe el tiu – aparte problema – de sinkronigo. Tia operacio multekostas, kaj ne ĉiuj landoj povas preni tion al si.

Italio

La kompetento de dublistoj (rilate tion la italoj estas renomaj en la tuta mondo) ebligas produkti filmversiojn tute analogajn al la originaj, tiel ke la publiko kutime eĉ ne ekkonscias, ke la projekciata filmo estas tiel adaptita.

En Italio la ĉeesto de subteksto absolute ne estas konsiderata. La vorto „subteksto” mem (*sottotitolo*) aliflanke pensigas tuj pri surdeco. Multaj italaj filmoj disponas subtekstojn por fremduloj en aliaj lingvoj. Kiam haveblas la italaj, tamen, oni klare precizigas, ke temas pri helpilo por ne-aŭdantoj (*non udenti*).

En Italio la ŝtata kanalo RAI tre pria-



Kaj ne ĉiam veras, ke oni dublas filmojn por montri, ke la propra lingvo estas supera al la ceteraj. Dublado simple igas filmon pli komprenebla kaj ĝuebla.

tentas la rajtojn de surduloj kaj lastatempe eĉ ekproponis al ili la senpagan, realtempan subtekstadon de preskaŭ ĉiuj elsendoj pere de sia *televideo* (paĝo 777). Oni do ne imagas, ke bonfartanta homo povus konscie elekti vidi la filmon per „surdula” maniero.

Greko

Estas aliaj landoj, kiel la nord-eŭropaj aŭ la balkanaj, en kiuj oni volontege akceptas la ideon rigardi filmojn en lingvo malsama ol la gepatra. Tie la homoj kontentiĝas pri blankaj, malvarmaj subtekstoj en la suba parto de la ekrano kaj neniom plendas. Tio okazas ekzemple en Kroatio, Turkio kaj Grekio. En ĉi-lastata lando oni tute sukcesis persvadi la popolon, ke estas bonŝanco povi plibonigi la propran konon de la angla (aŭ de alia lingvo) senpage.

La grekoj fieras pri tia „privilegio”, do ili mokus italojn kaj hispanojn, kiuj – laŭ ili – eĉ perfortas kinarton, sensciaj (fi!) pri la vera voĉo de Michael Douglas aŭ de Robert De Niro. Ili asertas, ke danke al nedublado la plimulto de la grekoj fluas en la angla (kvazaŭ tio estus internacia devo), dum italoj kaj hispanoj ne kapablas diri pli ol „saluton” kaj „dan-kon”, aldone per aĉa elparolo.

El centra Eŭropo oni replikas, ke subtekstoj distras kaj ne kompareblas al veraj dialogoj. Oni ne ĉiam komprenas, kiu el la personoj estas parolanta. Cetere, kiam vespere oni revenas hejmen post peniga labora tago, oni deziras sidiĝi kaj malstreĉiĝi, anstataŭ alfronti al leciono (ne petita) pri fremda lingvo.

Kiu pravus?

La debato estas interesa kaj verŝajne

ĉiuj (parte) pravas: certe pravas la grekoj, kiuj, kiel lernantoj diligentaj kaj, ekde la plej frua infanaĝo, eksterordinare malfermaj al aliaj lingvoj kaj kulturoj, akceptas rezigni sian lingvon por ĝui la belon de la origina versio.

Ili prave opinias, ke ne havas multe da senco aŭdi vakerojn, eskimojn aŭ indianojn, kiuj parolas en Italio per roma aŭ napola akĉento (kvankam ilin ne ĝenis, ke la heleno Aĥilo en la filmo *Troy* parolis angle).

Pravas tamen ankaŭ italaj infanoj, kiuj postulas itallingvajn animaciajn filmojn – dum en Grekio kelkfoje eĉ Bugs Bunny parolas la anglan – kune kun siaj geavoj, kiuj plejparte konas nur la italan kaj iuokaze eĉ ne tiun (pro la disvastiĝo de dialektoj). Por multaj televido estas ofte la sola plurestanta akompananto. Kiel konvinki ilin akcepti aŭdi volapukaĵon en la televido aŭ aĉeti novajn okulvitrojn por sekvi la disvolviĝon de nura filmo?

Libero

La plej demokrata solvo, en la nuna interaktiva erao, jenas: ebligi ajnajn eblojn. Ĉu ne estas fareble, ke oni rezervas al la sama filmo du apartajn ejojn, unu kun la loklingva versio por tiu, kiu en la kinejo volas nur sin amuzi, kaj unu kun pli „intelektula” versio, t.e. kun subtekstoj, simultana tradukado aŭ eĉ kritika komentario en aŭdiloj?

Rilate la malgrandan ekranon, oni povus facile, en epoko de tera cifereca televido, ebligi al ĉiu homo elekti la preferatan lingvokombinaĵon – se haveblan – por rigardi filmon: en la itala kun anglaj subtekstoj, en la germana kun turkaj, en la korea kun esperantaj ktp. Sufiĉus unu aŭ du pliaj klavoj, similaj al tiuj jam ekzistantaj ĉe la teleregiloj de dvd-legiloj.

Anstataŭ debati kaj priridi aliajn pensmanierojn – kion ofte oni ŝatas – oni trovu solvon taŭgan por ĉiuj. Ĉu oni ankoraŭ ne lernis el la zamenhofa proverbaro, ke „pri gustoj oni disputi ne devas” aŭ ke „kiom da homoj, tiom da gustoj”?

Roberto Pigro

EKSA JUGOSLAVIO

Antaŭ 30 jaroj

En la norda Makedonio okazis solenaĵo por memorigi eventojn de antaŭ 30 jaroj, kiam etnoalbanoj manifestaciis sub la slogano „Kosovo-Respubliko”.

En la tiama Jugoslavio albanoj, konsiderataj duagradaĵoj civitanoj, okupis laŭnombro la trian lokon – post serboj kaj kroatoj – sed ne posedis sian ŝtaton-respublikon. Aliaj nacioj – makedonoj, montenegranoj, bosnia-

noj kaj slovenoj – jam havis siajn.

Do en Tetovo, kie loĝas multaj albanoj, oni okazigis paroladojn, kiuj prilumis la tiamajn tempojn. Oni aŭdis, ekzemple, pri la subpremado de manifestaciintoj flanke de policanoj kaj armeanoj, el kiu sekvis enkarcerigoj kaj mortoj. La protestoj kondukis al la disfalo de la tiama Jugoslavio.

Bardhyl Selimi

LITERATURO

Kvarone Sabate

Kondolence notis albanoj la forpason de la argentina verkisto kaj pentristo Ernesto Sabato, kiu mortis 99-jaraĝa en aprilo.

La gepatroj de Sabato devenis de la suda Italio, sed lia patrino estis albandevana. Pro tio Sabato deklaris, ke „kvarono mia estas albana”. En sia studĉambro li tenis gravuraĵon pri la albana nacia heroo Skanderbeg.

En 1996 li vizitis la albanan ĉefurbon Tirano por ricevi la beletran premion „Kadare”. La albana prezidanto donis al li la titolon „La honoro de la nacio”.

La unua kaj vaste laŭdata romano de Sabato, *La tunelo*, aperis en 1948. Ĝi estas tradukita en pli ol 10 lingvojn.

Bardhyl Selimi



IRLANDO

Plej optimisma popolo



CAUSE PERDUE

Miloj da homoj de ĉiu kategorio kaj nivelo nun restas sen laboro.

Dum la periodo de la tiel nomata Kelta Tigro – tio estas precipe inter 1995 kaj 2000 – Irlando, ĝis tiam rigardata kiel unu el la plej malriĉaj ŝtatoj en Eŭropo, transformiĝis al unu el la plej prosperaj.

Kompreneble ne ĉiuj civitanoj partoprenis la avantaĝojn de la nova Irlando. Kiel ofte okazas en „riĉaj” socioj, la riĉuloj iĝis pli kaj pli riĉaj, dum la malriĉuloj restis malriĉaj. Tamen, ĉirkaŭ 2008, la ekonomio komencis disfali. Ĉesis amasa enmigrado, kreskis elmigrado – „normala” kondiĉo en la malnova Irlando.

Fine, pro la misa administrado de la bankoj kaj pro la korupto kaj la malsaĝo de la registaro, Irlando devis peti kolosan finanĉan helpon de Eŭropa Unio kaj de pluraj financaj instancoj. Ĝi nun troviĝas en kriza stato simila al tiu de Grekio kaj Portugalio.

Vakaj vendejoj

Miloj da homoj de ĉiu kategorio kaj nivelo nun restas sen laboro; en ĉiuj

urboj oni vidas vicojn da vakaj vendejoj, oficejoj kaj domoj. Impostoj altiĝas; socialaj pagoj ŝrumpas; sanservoj neadekvatas kaj, en kelkaj lokoj, preskaŭ ne ekzistas.

Tamen, tamen, la tipa irlandano estas tre originala persono. Lastatempe, opinio-sondado en la Verda Insulo konstatis, ke irlandanoj taksas sin „la plej kontentaj kaj optimismaj en la mondo”.

La rezulto indikas, ke laŭ optimismo-skalo, irlandanoj troviĝas sur preskaŭ la sama ŝtupo kiel aŭstralianoj kaj kanadanoj. Oni demandas sin, kial. Neniu optimismo-motivo montras sin en la hodiaŭa Irlando.

Invadataj

La kialo kuŝas en la karaktero de la irlandanoj. Dum sia tuta historio, ili estas invadataj, subpremataj kaj mistraktataj, ne nur de siaj najbaroj kaj de aliaj fremduloj, sed ankaŭ de ali-tribanoj, aliaj et-regnanoj, ali-religiuloj.

Ili terure suferis de malsato, malsano kaj elmigrado de siaj gefiloj. Multaj vivis en mizero; multaj ankoraŭ loĝas en netaŭgaj kaj malhigienaj loĝejoj. Sed



MICHELO806

Tamen, tamen, la tipa irlandano estas tre originala persono. Lastatempe, opinio-sondado en la Verda Insulo konstatis, ke irlandanoj taksas sin „la plej kontentaj kaj optimismaj en la mondo”.

neniam mankas la resalteco kaj la natura esperemo de la nacia karaktero. Laŭ onidiro: „La situacio en Irlando estas ĉiam katastrofa, sed ĝi neniam estas serioza.”

La graco kaj beno, kiuj savas, kaj ĉiam savos irlandanojn de totala malvenko, estas ilia nevenkebla humorsento. En ĉiu situacio, la tipa irlandano ĉiam trovas motivon por ridi kaj ŝerci. Lia kapablo ŝerci baziĝas parte sur la subtavolo de la gaela lingvo kaj ĝia bizara kaj komika logiko, kiu influas eĉ la hiberno-anglan lingvaĵon de hodiaŭ. Sed ankaŭ ĝi estas integra elemento de la irlanda animo.

Sinmortigoj

Bedaŭrinde estas gravaj esceptoj. Se ŝarĝoj estas sufiĉe pezaj, eĉ la plej forta dorso povas kolapsi. Lastatempe la nombro de sinmortigoj, precipe inter junaj viroj, maltrankvilige pliiĝis. Sed ĝenerale la etoso en Irlando estas kore – se ne ĉiam vetere – suna kaj kuraĝiga.

En la semajno, en kiu mi skribas ĉi tiun artikolon, mi kaj mia edzino ĉeestis grupeton, kiu ĉiujauĉe renkontiĝas en loka hotelo por interŝanĝi ideojn pri io ajn: literaturo, aktualaĵoj, filozofio, muziko, novaĵoj ktp ktp. En tiu okazo, ni diskutis kaj agrablajn kaj malagrablajn temojn, sed la afero finiĝis per ŝercoj kaj ridoj.

Ni decidis, ke la irlandanoj estas nekuraceble humuraj kaj gajaj. Eĉ se la ŝtata ŝipo sinkas, ili restos, naĝante sur la surfaco, ridante kaj kantante. La angla verkisto G. K. Chesterton skribis pri la „grandaj gaeloj de Irlando / homoj, kiujn Dio frenezigis / kies militoj estas ĉiuj gajaj/kaj ĉiuj iliaj kantoj malĝojaj.” Certe li pravis.

Garvan Makaj

La plej granda tragedio

Falis la nombro de litovianoj. Hodiaŭ en Litovio loĝas 3 053 800 personoj, antaŭ dek jaroj 430 000 pli. Tio signifas, laŭ spertuloj kaj aliaj sociaj analizistoj, ke la lando pereas kaj ke la registaro ne kapablas ĝin savi.

La vicprezidanto de la Litova Banko Raimondas Kuodis diris: „Tiuj tri milionoj ne povas kaŝi la ĉefan direkton kaj tendencon de nia lando: homoj strebas forlasi Litovion, forkuras, ne volas ĉi tie loĝi. Tio estas la plej granda tragedio de Litovio.”

Korupto

„Elmigradon”, aldonis Kuodis, „instigas ne nur la ekonomio, sed ankaŭ la morala kaj politika klimato, ekzemple socia maljusteco, korupto kaj duobla kriterioj por elektitoj kaj elektintoj.”

Ankaŭ la direktoro de la Instituto de Laboraj kaj Sociaj Esploroj Boguslavas Gruzevskis ne kaŝis sian disreviĝon. „Estas neimagebla situacio”, li diris. „Milito forestas, sed la loĝantaro malaperas. Verŝajne la radikoj de la problemo nestas en nia socia kaj ekonomia ĉirkaŭaĵo. La registaro nepre esploru, kial homoj ne volas loĝi en Litovio.”

Strategio

La ĉefministro de Litovio Andrius Kubilius diris: „Por ni ege gravas, ke tiuj, kiuj nun estas for de Litovio, ne perdu ligan kun sia gepatra lando kaj vidu la eblojn por reveni. Ekzistas aprobita tiurilata strategio.”

Li aldonis: „Kiel ekzemplon Litovio povus havi Irlandon, kiu en la 1990aj jaroj modernigis sian ekonomion. Tio helpis regajni elmigrintojn. Tamen la loĝantaro de Litovio malkreskas ne nur pro elmigrado, sed ankaŭ pro malgranda nasko.”

LAST



Elmigrado: la tragedio de Litovio.

IRLANDO

Kverkoj kaj kuzoj

Majo 2011 estis eksterordinara monato en Irlando. De la 17a ĝis la 20a la irlanda nacio varme bonvenigis la reĝinon de la „antikva malamiko”, Britio.

Nur tri tagojn poste la usona prezidento, Barack Obama, faris unutagan viziton por konatiĝi kun siaj irlandaj parencoj kaj kun la vilaĝo Monegall [monegol] (gaele: Muine Gall), la hejmo de sia prapatra onklo, kiu elmigris al Usono en 1850.

Konate estas, ke Obama estas de kenja deveno, flanke de la patro, sed ĝis antaŭ nelonge ne multaj sciis, ke, flanke de la patrino li havas ankoraŭ vivantajn parencojn en la Verda Insulo.

Sekureco

La preparoj kaj aranĝoj por la vizito de la du eminentuloj estis tre malsamaj. La brita reĝino Elizabeth, kune kun sia edzo, la princo Philip [filip], modeste alvenis per negranda reĝa aviadilo, kaj ilia sekureco estis prizorgata de la *Garda* (la polico de la respu-

bliko) kaj de la irlanda armeo.

La Blanka Domo evidente ne fidis eksterlandajn certigojn (eĉ tiujn de Irlando, eble la plej usonamika nacio en la mondo) pri ties kapablo protekti la prezidenton. Antaŭ la alveno de Obama aro da grandaj grizaj aviadiloj surteriĝis en irlanda flughaveno, portante diversajn kirasitajn veturilojn, ambulancon, militajn helikopterojn kaj taĉmenton de korpogardistoj, sekurecaj policanoj kaj armeanoj.

Parencoj

Plantinte kverkon en la ĝardeno de la irlanda prezidentejo, Obama flugis per helikoptero al Monegall. Tie li renkontis sian okan prakuzon, Henry Healy [henri hili], kun kiu – kaj kun aliaj parencoj – li estis fotita.

Konsentite estas en Irlando, ke ambaŭ vizitoj – la reĝina kaj la prezidanta – inspiris kaj kuraĝigis la irlandan popolon, aparte nun, meze de grava ekonomia krizo sen videbla elirejo.

Garvan Makaj

JUNULARO

Ĉiam pli malalten



PUBERTAS35

Kiel edukisto kun jam jardeko da enklasa sperto, permesu al mi senpeziĝon pri junularo, kiu daŭre min mirigas, bedaŭrinde ne favore.

Kion diri pri la nuntempa junularo? Multaj opinioj, ke 32-jarulo kiel mi ne tre taŭgas por respondi al tiu ĉi demando. Pluraj cetere konsideros min ankoraŭ „juna” instruisto de la itala lingvo, „juna” patro, „juna” edzo ktp.

Sed, kiel edukisto kun jam jardeko da enklasa sperto, permesu al mi senpeziĝon pri junularo, kiu daŭre min mirigas, bedaŭrinde ne favore. Miaj konsideroj pivotas ĉirkaŭ plurjara observado, sed la apoteozo, la lasta guto, kiu okazigis elverŝon, estis la maja ekskurso de la liceo, kie mi laboras.

Ni iris al la montoj, ĉe bela kaj pura piknika ejo. En tiaj tagoj, ĉiu kiu volas – plejparte aŭdacaj instruistoj – ekspluatas la okazon por marŝi tra la arbaro, por trovi tiun kontakton kun la naturo,

kiun la urbo kun siaj frenezaj ritmoj oftege perdigas; plimulto, pli pigra, plenpulme spiras la puran aeron de la montoj ... nure sidante sur benkoj.

Kradrostaĵo

Multe da geknaboj (ne el infanĝardeno, sed el liceo) siaflanke fofas, kuras kaj ludas kaj ĉio ĉi sufiĉas por kontentigi ilin. Iel ajn, ĉiuj – je la fino de la ekskurso – honoras la kradrostaĵon, kiu en Kipro estas deviga kaj kiun, dum la tuta mateno, kelke da volontuloj kun engaĝiĝo pretigis.

Kio konsternis min: unue, je ekskursofino, la piknikejo ŝajnis detruita per fero kaj fajro, kvazaŭ vizitite de barbaroj. Boteloj, suĉoŝalmoj, plastosaketoj paradis apud tio, kio restis el terpomoj, tomatoj, hamburgeroj kaj aliaj nutraĵoj.

Mi kaj aliaj instruistoj kolektis per niaj manoj la balaĵojn, nehelpe de la gelernantoj, kiuj asertis, ke „aliuloj” respondecas. Ili rigardis nin, kun kukumoj en la abomene malpuraj manoj, eĉ naŭzite.

Malpermeso

Super la fontano de la piknikejo, panelo klare indikis, en la loka lingvo, ne volapuke, la malpermeson lavi telerojn. Tamen ĉion lavis niaj junuloj, eĉ per detergentoj, por ke nenio stinku en la aŭtobuso. La malpermeso klariĝis iom poste: la elflu-akvo, kun sia bela ŝaŭmo, kuris rekte en la apudan rivereton.

Dum en Afriko (eble en Eŭropo) la homoj mortas pro malsato, plurajn kilojn da viando, kaj kuirita kaj kruda, ĵetis niaj lernantoj en rubujon. La nekuirita viando, ekster la fridujo jam de la mateno, laŭdire putras ĝis la reveno al Limasolo.

Unu el la abiturientkandidatoj inte-

ralie petis al klas-kunuloj kaj al geinstruistoj skribi etan dediĉon en sian memorlibreton. Mi pripensis tion iomete kaj poste, konvinkite pri la taŭgeco de frazo gardota dum jardekoj, skribis al la knabino mallongan latinlingvan bondeziron (*ad maiora*, „ĉiam pli alten”).

Zamenhof

Sed poste, foliumante pro scivolo la libreton, mi vidis, ke junulo, al kiu antaŭ kelkaj tagoj mi estis faranta lecionon pri Zamenhof kaj Esperanto, skribis al la sama knabino la dikliteran vorton: „ĉiesulineto”. Imagu la miron de ŝia filo, kiam tiu iam traserĉos la memorindaĵojn de la patrino.

Senkuraĝigite, mi reiris al la aŭtobuso, ege volema reveni hejmen, post mizera ekskurso. Ekveturonte, mi vidis apud la veturilo hundon vosto-svingantan. Ĝi ne estis aparte bela, kiel ja multaj vagantaj hundoj, sed ĝi ŝajnis malsovaĝa kaj min ne malmulte komptigas.

Per dolĉa rigardo ĝi ŝajnas ĝisi siajn novajn amiketojn antaŭ ilia ekveturo, mi kredis. Nur tiumomente mi aŭdis knabino: „Rigardu, jen la hundo, al kiu la kretenoj de 3B ĵetis ŝtonegojn.”

Civilizacio

Dum la tuta vojaĝo, mi demandis min, kion ni edukistoj faras (aŭ eble ne faras) por estigi tiajn kreitaĵojn. Kiu fakte respondecas? Ĉu gepatroj kaj instruistoj ne klarigas al geknaboj iom pri civilizacio, iom da vivkono? Ŝajne ne, ne sufiĉe.

Ni parolas pri valoroj kaj idealoj, kiaj medidefendo, bestoprotektado, ambaŭflanka respekto, energioŝparo, sed eble je tiaj fabeloj eĉ ni edukistoj ne kredas.

Mi faras la plejblon, eĉ klopodante igi scivolaj tiujn junulojn pri la internacia lingvo, esperante vekti en ili emociion, ekstremon, revon pri pli bona mondo, ian ajn senton, diable, sed je la fino de la leciono ĉiuj elkuras por kartludi.

Poŝtelefono

Eĉ la plej sensciaj havas poŝtelefonon *Blackberry* (dum mi ĵus aĉetis belegan, ĉinan, kontraŭ 25 eŭroj), en socio, kiu vetas jam ĉiun aferon je la „havo” kaj ne je la „esto”: du planedoj malproksimaj je lumojaroj.

Kial studi, kial revii, se ĉio ajn estas je ĉies dispono en ĉiu momento? En tiu ĉi junularo, pardonu min, mi rekonas nenion el mia (sufiĉe freŝa) juneco. La nuntempa, almenaŭ en Kipro, ne legas kaj ne studas, scipovas kaj volas nek paroli nek skribi pli ol mesaĝeton, sed ekzaltiĝas pro la vilao, kiun la gepatroj ĝismorte pagos al banko, kaj pro Ipodo al si senkiale aĉetigita, aŭ pro aliaj bagateloj tiaj.

En kelkaj landoj oni debatas, ĉu ler-nantoj ekstaru, kiam instruisto eniras en klason. En Kipro male la problemo estas eksidigi ilin. Disciplino, kiel ni ĝin konceptas, ne estas, kaj se oni aŭdacas riproĉi 18-jaran „knabeton” aŭ fi!-krii por estiĝi silenton, la gepatroj plendas kaj minacas perdigi

al oni la laboron.

Mi taskis al klaso de plenkreskuloj verki unupaĝan itallingvan tezeton en la daŭro de monato. Patrino plendis, ĉar iun nokton (la lastan, kompreneble, antaŭ la templimo) ŝia filino studis por mia studobjekto ĝis la 1a.

Universitato

„Ne forgesu, ke temas pri 18-jaruloj!” ŝi diris al mi. Plej ironie estas, ke tiu knabino kaj ŝia patrino petas eksplicite kaj senpudore altajn notojn (t.e. almenaŭ 19 el 20!) por aliri britan universitaton, kien – inter ni – multaj gekipranoj iras sen ia merito, per pufigitaj notoj donitaj de la nuptatestanto de la baptopatro ...

Kiel paroli al tiaj homoj pri Esperanto kaj kulturo? Kio gravas estas la noto: kio kaŝiĝas malantaŭ ĝi, kion tiu noto signifas, tio ne gravas, ĉar la rezulto (t.e. aliro al brita universitato, kvazaŭ en la cetera mondo ne ekzistus la eblo studi) ne ŝanĝiĝas.

Mi fojfoje min demandas, kie mi trovas motivojn por ne kapitulaci, por plu kredi, ke ĉi tiu junularo estas digna je aprezo kaj konfido, kaj ke, spite al la ŝajno, ĝi estas plena de idealoj kaj valoroj, kiujn gepatroj kaj instruistoj ne vidas.

Roberto Pigro



Kial studi, kial revii, se ĉio ajn estas je ĉies dispono en ĉiu momento?

HEJMOJ

Kovriiloj, kurtenoj – ĉiakoloraj

Grekiion skurĝas daŭra krizo, sed ne ĉiuj senkuraĝiĝas. Multaj homoj, sen monrimejoj por distriĝi en trinkejoj aŭ restoracioj, remalkovras la varmon de siaj hejmoj. Spite al ekonomiaj problemoj, grekoj emas laŭeble komfortigi siajn hejmojn, atendante, ĝis la ekonomia suno releviĝos.

Tiun inklinton sukcese ekspluatis nederlanda dezajnistino loĝanta en Grekio. Ĉe la retejo de Aletta Smit, el Tesaloniko, klientoj povas mem elekti kolorkombinaĵojn de litukoj por akordiĝi kun la koncerna dormoĉambro.

Futbalo

Anstataŭ vane travagi butikon post butiko, kliento povas nun per musoklako mem proponi desegnaĵon. Ekzemple, se infano fanatikas pri futbalo, tiu povas havi littukon kaj kurtenojn en la koloroj de la ŝatata teamo.

Evidente klientoj sendu la dimensiojn de la dezirataj varoj al la jam 40 jarojn ekzistanta firmao, kiu, pretiginte la mendon, ekspedas la kovriilojn aŭ kurtenojn.

La retejo, nur en la angla, itala kaj nederlanda lingvoj, jenas: www.custom-bedding.com.

Roberto Pigro

Artikolojn pri la vivo
en via regiono sendu al
moderna_vivo@monato.net

BURUNDO

Pri elefantoj kaj herbejoj

Mireille Grosjean vizitis Burundon en aprilo kaj sendis jenan kunverkitan raporton:

Burundo travivis dum jardekoj militon, kiu finiĝis en 2005. Tio signifas, ke vundoj ankoraŭ doloras en ĉies koro, en ĉies memoro, en ĉies kapo, eble en kelkaj korpoj. Gravus nun paco; gravus, ke la popolo unuiĝu, lernu

kune kaj harmonie vivi.

Tion celante, la registaro dungis pacperanton, s-ron Rukara, kiu alfrontas grandan kaj gravan taskon. Por tiun plenumi, li ellaboris por la popolo diversajn kaj komunajn aktivaĵojn kaj taskojn.

Manoj

Tiuj laboroj okazas sabat-matene tra la lando. Popolanoj komune ion konstruas, purigas, kaj tiel kune ŝvitias sed interkonatiĝas. Admirinde estas, ke same kunlaboras registaranoj. Tiuj aperas simple vestitaj kaj man-en-mane laboras kun popolanoj. Jen fenomeno malofta en la mondo: ĝenerale politikistoj malaperas en luksaj veturiloj kaj ne malpurigas siajn manojn. Male en Burundo.

Mi partoprenis tiujn komunajn laborojn. Dum portado de tero en sakoj miaj kunlaborantoj estis la pacperanto mem, s-ro Rukara, kaj la parlamenta prezidanto, s-ro Ntavyohanyuma. Kun tiu mi povis diskuti la lingvan situacion: la franca estis, la angla estas. Afrika proverbo diras: „Kiam elefantoj luktas inter si, herbejo suferas”. Denove afrikanoj estas viktimoj. „Eble via lingvo estas la solvo”, diris la parlamenta prezidanto.

Teamoj

Alia strategio de la pacperanto estas piedpilka ĉampionado. Piedpilkado popularas en Afriko. Kiam s-ro Rukara notis, ke inter motociklistoj kaj policistoj ekzistas streĉoj, li starigis piedpilkajn teamojn. La du teamoj ludis en stadiono: fine venkis la motociklistoj.

Ne facilas repacigi landon post longdaŭra milito, kiam oni kutimas pensi etne, ne home. La pacperanto havas pezan respondecon. Sed ankaŭ Esperanto helpas: parolantoj de la lingvo, eĉ tiuj de diversaj etnoj, jam kutimiĝas al kunvivado, kunlaboro, interparolado kaj interhelpo.

Mireille Grosjean, Eric Nsabyumva



MIREILLE GROSJEAN, ERIC NSABIYUMVA

La aŭtorino, Mireille Grosjean, staras inter la pacperanto, s-ro Rukara (maldekstre) kaj lia kabinetestrino, s-ino Niyongabire.

Bruas la mezepoko

La Hansa Ligo, kiu kunigis ĉ. 200 urbojn en Eŭropo, aktivis inter la 13a kaj 17a jarcentoj. Ĝi estis komerca organizaĵo, kiu samtempe substrekiis municipan regadon, humanismon kaj reciprokan apogon.

La samajn principojn transprenis en 1980 la interurba Nova Hanso, kiu hodiaŭ kunigas 176 urbojn. Uzante malnovajn valorojn de la iama Hansa Ligo, ĝi celas evoluigi socian, ekonomian kaj kulturalan kunlaboron en Eŭropo.

Nunaj hansaj urboj situas precipe en Germanio, Pollando kaj Rusio. En ili loĝas pli ol 200 milionoj da homoj. En Litovio la sola hansa urbo estas Kaunas, kie okazis en majo la internacia hansa renkontiĝo, organizata ĉiujare en unu el la hansaj urboj.

Entrepreneuristoj

Laŭdire la festo estis la plej granda



Ne mankis amuzadoj por partoprenantoj dum la ĉi-jara hansa renkontiĝo, kiu okazis en Kaunas, Litovio.

kaj impona iam ajn aranĝita en la urbo. Kunvenis entreprenistoj, kiuj dum kvar tagoj ne nur parolis pri komercaj aferoj, sed ankaŭ ĝuis pli ol cent diversajn distraĵojn.

Sur la urbodoma placo en Kaunas bruis senpaŭze mezepoka foiro. Oni bakis panon, fumaĵis fiŝojn, kaj eblis ĝui germanan bieron, estonajn mezepokajn dolĉaĵojn, rusajn krespojn kun kaviaro ktp.

Partoprenis artistoj, kiuj ekspoziciis interalie ceramikaĵojn kaj lignaĵojn. Starigita estis antikva vakso-fandforno, kaj estis kreita 60 kg peza vaksajo. Konstruita estis mezepokstila urbo, kaj okazis tiutempa karnavalo kun interalie turnirantaj kavaliroj.

Pli ol 700 000 spektantoj ĝuis la eventon, kiu ripetiĝos venontjare en la germana urbo Luneburgo.

Jen la tub-ero



DASPARKHOTEL.NET

La unua Parkhotelo estis malfermita antaŭ ses jaroj en Ottensheim apud Linz, Aŭstrio. Ĝi situas sur la bordo de Danubo kaj konsistas el grandaj tuboj, en kiuj estas hotelĉambroj. La prezon de tranoktado difinas la gasto.

Ĉiu tubo havas diametron 2 m, longecon 2,6 m kaj pezon 9,5 t. Laŭ Andreas Strauss [ŝtraus], iniciatinto de la projekto, la tubĉambroj posedas bonan bru-izoladon.

Interne estas duobla lito, littolajoj, aldonaj kovriloj kaj lampo. En la plafono estas fenestreto. Proksime al la tubĉambroj troviĝas kafejo, minibufedo, necesejo kaj banejo.

Serurkodo

La hotelo funkcias de majo ĝis oktobro. Tubĉambron oni rezervas rete. Oni ricevas seurkodon por eniri. Forirante, oni lasas la pagon en kesto ene de la tubo. Kutime la gastoj pagas por tranokti inter kvin kaj 50 eŭrojn. Oni rajtas gastu maksimume tri tagojn.

La ideo pri tubo-tranoktado iĝas populara. Ekde majo funkcias dua Parkhotelo tia en Germanio. La hoteloj kontakteblas ĉe www.dasparkehotel.net (germane, angle).

Evgeni Georgiev

Kampara fabrikado

Antaŭ cent jaroj, en multaj vilaĝoj de la sud-germana regiono Palatinato, la plej granda parto de la familioj vivis pere de la propra bieneto.

La kampa tereno sufiĉis por plimalpli bone nutri sin el la memprizorgitaj produktaĵoj, por bredi la necesajn dombestojn kaj akiri iom da mono fare de la vendado de lakto, legomoj kaj fruktoj. Dum la rikolto, ĉiuj familianoj, eta grupo el tri generacioj, kune kampe laboradis.

Hodiaŭ la situacio estas tute ŝanĝiĝinta. Postrestas vilaĝe nur du-tri bienegoj, kiuj, kvazaŭ kamparaj fabrikoj, reagis al la postuloj kaj ebloj de la internacia merkato.

Sterko

Ne plu rezultas nur unu rikolto en

unu jaro. Helpe de industria sterko, tuba akvoalkonduko kaj ĉiaj maŝinaj kaj kemiaj rimedoj, almenaŭ tri rikoltoj de diversaj fruktoj el unu kampo estas eblaj.

Kompreneble ne plu sufiĉas familia laborforto. Malgraŭ la abunde utiligataj maŝinoj, la rikolto de specifaj fruktoj kaj legomoj ne povas rezigni pri homaj sperto kaj laboremo. Tiajn kvalitojn oni ne plu trovas multe en la regiono. Germanaj senlaboruloj preferas kontente kvitanci la ricevon de la ŝtata apogo, ol klini la dorson antaŭ salatoj kaj asparaĝoj.

Kaĝoj

Jen la ŝanco por laboremaj viroj kaj virinoj el orienta Eŭropo. Ili aperas amase dum la rikoltaj sezonoj, loĝas

senplende en konteneraj kaĝoj kaj laboregas kampe tie, kie la dunginto ilin sendas.

Povas okazi, ke oni bezonas eĉ plurajn centojn samtempe por rikolti ajlocepojn el nur unu kampego. Kaj posttagmeze la rikolta armeo, strategie organizite, aperas 20 kilometrojn fore por eltiri kaj vendoprepari rafanetojn.

Festeno

Post la rikolta sezono la regiona registaro invitas al „Rikoltodanka festeno”, fiere titolante sin „Ĝardeno de Germanio”. Freŝe kuŝas la fruktoj sur la podio.

Oni eĉ ne flaras la kreskigan helpon de kemiaĵoj, de malpura akvo kaj de la reuzitaj restoj el la regionaj kloakoj, la ŝviton de migrantaj laboristoj. Tiam tiuj orient-eŭropanoj jam longe estas denove hejme kaj ne ĝenas la solenaĵon.

El la loka vivoneesaĵo estas fariĝinta tutmonda merkato. Novaj epidemioj, ne plu familiaj, sed mondvastaj, salutas: Bonan apetiton!

Franz-Georg Rössler



Unukampe tricent rikoltistoj – sed finsezono ne la dankojn de bienistoj kaj konsumantoj ili rikoltas.

Tamtamas ŝtopiĝoj

TomTom, la renoma marko de navigiloj, ne nur helpas aŭtomobilistojn trovi la vojon, sed ankaŭ aŭtomate ricevas informojn de siaj uzantoj. Tiel ĝi povas kontroli 30 milionojn da aŭtoj kaj analizi 800 miliardojn da donitaĵoj en unu jaro.

La sistemo havigas informojn pri la vojo, sed ankaŭ kalkulas kiom da „normala” tempo necesas por la koncerna distanco. Kiam ŝoforo bezonas trionon pli da tempo, aŭ kiam dum pli ol 70 % de la vojaĝo tiu ne sukcesas veturi je normale permesata rapideco, ĝi supozas, ke okazis trafikŝtopiĝo. Tiel TomTom povas analizi la vicoproblemojn en Eŭropo.

Unua loko

En Bruselo oni suferas plej multe. Dum 38,9 % de la ĉiutagaj vojaĝoj okazas ŝtopiĝo. Tiu cifero superas tiujn de Varsovio (38,8 %) kaj Londono (34,5 %). Jam pasintjare Bruselo havis la unuan lokon, sed la situacio malboniĝis (tiam 37,7 %).

Surprizas la nombro de trafikaj dispejsioj en Britio. En la listo de la

20 plej problemaj urboj troviĝas ok britaj.

Londono enkondukis vojimposton en 2003, sed la ŝtopiĝoj apenaŭ malpliĝis (nur 0,2 %). Ankaŭ Oslo havas imposton, sed ankaŭ tie la ŝtopiĝoj restas (26,9 %). En Milano oni eĉ nuligis la sistemon, ĉar la ŝtopiĝoj ne malkreskis, dum elspezoj pli altis ol elspezoj.

Limigo

La brusela urbestro eĉ kreis ŝtopiĝojn, mallarĝigante vojojn, komplikante vojkruciĝojn kaj limigante rapidecon en la urbocentro al 30 km hore. Tiel oni celis malkuraĝigi aŭtomobilistojn atingi la urbon per privata aŭto.

Neniu nederlanda urbo troveblas en la listo de la 20 plej ŝtopitaj lokoj. Barcelono, kiu pasintjare troviĝis en la 17a loko, nun malaperis el tiu ĉi listo. Sed la plej spektakla pliboniĝo okazis en Dublino, kie ŝtopiĝoj malkreskis je 9,7 %. Sendube tio ŝuldiĝas grandparte al la ekonomia krizo.

Ivo Durwael



RUIGER MIDDENDORP

Vilaĝo ĉine ĉarma

Hallstatt estas pitoreske situanta vilaĝo ĉe samnoma lago en Supra Aŭstrio. La vilaĝo tiel plaĉis al ĉinaj arkitektoj, ke ili sekrete faris kopion de la loko. Tamen antaŭe ili devis informi la lokajn loĝantojn, kiuj ne tre ĝojas pri tio.

En la vilaĝo ekscitiĝon provokis la novaĵo, ke ĉina entrepreno faris detalfidelan kopion de la romantika loko. La arkitektura projekto jam multe progresis. Ĝi estas destinita por la sudĉina urbo Boluo en la provinco Guangdong.

La foiran placon kun domoj, kolono de la triunuo, preĝejo kaj hotelo *Grüner Baum* (Verda arbo) oni kopie konstruos laŭ la originala grandeco. Krome oni estigos ankaŭ kopion de la lago en malpli grandaj dimensioj.

Kulturheredaĵo

Ĉinaj arkitektoj esploris dum la pasintaj monatoj la vilaĝon, kiu havas 815 loĝantojn kaj kiu ekde 1986 estas en la listo de mondaj kulturheredaĵoj de Unesko. La vilaĝestro Alexander Scheutz diris, ke li miras, sed ne indignas, aldonante, ke ĉiujare la vilaĝon vizitas 800 000 turistoj.

La vilaĝestro konstatis ankaŭ favoraĵon: „Ni povas fieri pri tio. Fakte ĝi estas bonega reklamo por nia komunumo. Estontece multaj ĉinoj volos vidi la originalon.”

Ankaŭ turismaj spertuloj vidas avantaĝojn por Hallstatt. Multaj ĉinoj travojaĝantaj Eŭropon vizitas tiun belan lokon, kio gravas al la vilaĝo el ekonomia vidpunkto.

Evgeni Georgiev

Revoj pri skistogaso

Post la vizito al Usono de Arvydas Sekmokas, la ministro pri energio, la registaro jubilis pri la ekzisto de aglomeraĵoj de skistogaso en Litovio kaj tiel konfirmis sian optimismon pri energia sendependeco. Onidire jam venontjare, danke al privata investanto, povus komenciĝi esplorboradoj. Geologoj supozas, ke en Litovio la skistogasa areo povas konsisti el 480 miliardoj da kubaj metroj, el kiuj eblus ekspluati 100 miliardojn, je valoro de 10 ĝis 30 miliardoj da usonaj dolaroj.

Al la demando, kiam skistogaso povus aperi en Litovio, la ministro respondis, ke la rezulto ne povas esti rapida. „Atendas kvaretapa laboro. Unue, ni devus certiĝi, kiom granda estas la rezervo. Due, necesas fari esplorojn. Trie, ni devus testi la rezultojn etskale. Nur fine venos la kvara etapo – industria akirado. En Usono oni por tio bezonis pli ol dek jarojn, en Pollando malpli.”

Jonas Satkunas, vicdirektoro de la Geologia Oficejo de Litovio, estas pli optimisma. Liaopinie, se ĉi-jare glate

pasus konkurso por elekti kompanion por fari la esplorojn, la unuaj testboradoj jam povus esti farataj sekvontjare. En la plej sukcesa kazo, skistogaso povus esti minata nelonge poste.

Delonge konata

Kio estas tiu skistogaso? Simple dirite ĝi estas ŝtoniĝinta argilo, kiu enhavas kelkajn procentojn da organika materialo, el kiu povas eliĝi gaso. La gaso estas minata per pistado de skistoj. Ju pli multe tiuj tavoloj estas pistataj des pli da



Vicdirektoro de la Geologia ofico de Litovio J. Satkunas diras, ke oni ne bezonos eĉ dek jarojn ĝis skistogaso estos minata en Litovio.

gaso eliĝas.

Unuaj informoj pri skistogaso kuŝanta en la sino de Litovio, precipe en ĝia okcidenta parto, aperis jam en la jaro 2004. Unuaj pri tio ekparolis kompanioj kiuj en Litovio minas petrolon. Tamen neniu intencis eligi la gason, ĉar tiam mankis efika teĥnologio.

La temo de skistogaso en la mondo jam flirtas dum ĉirkaŭ tridek jaroj, tamen ĝia minado ĝis nun ne estis ekonomie rendimenta. La ĉefa diferenco inter ordinara natura gaso kaj skistogaso estas, ke aglomeraĵoj de natura gaso kuŝas koncentrite sur relative malgranda teritorio. Tian nature formitan rezervejon eblas ekspluati dum 30 ĝis 40 jaroj. Dume skistogaso disvastiĝas en multe pli granda teritorio. Por mini ĝin necesas komplika instalaĵo kaj preskaŭ ĉiujare novaj bortruoj en aliaj lokoj.

El ekologia vidpunkto skistogaso estas problemiga. Ĝi enhavas multe da metangaso, kiu estas konsiderata danĝera por la naturmedio. Por la pistado estas



Ĉefministro de Litovio Andrius Kubilius revas pri energia sendependeco.



La ministro pri energio Arvydas Sekmokas optimistan gasideon alportis el sia vizito en Usono.

uzataj kemiaĵoj, kiuj parte restas subtere kaj povas polui la grundakvon.

Skistogaso nun vere furoras en Usono. Pasintjare, pro plibonigita teknologio, la lando per ĝi kovris dek procentojn de siaj gasbezonoj.

La litova ĉefministro Andrius Kubilius deklaris, ke se Litovio entreprenus minadon de skistogaso, ĝi povus almenaŭ dum 30 ĝis 40 jaroj kontentigi siajn gasajn bezonojn. Nuntempe la lando jare uzas ĉirkaŭ tri miliardojn da kubaj metroj da natura gaso.

LAST

KOSOVO

Facilas investi

Kvankam povas aspekti iom mirinde, en Kosovo estas multaj fremdaj investistoj kaj komercistoj. Laŭ informoj de www.albinfo.ch, ĉe la Agentejo pri Stimulado de la Investaĵoj estas jam registritaj 3906 eksterlandaj entreprenoj.

Germanoj okupas la unuan lokon, poste venas Albanio kaj Svisio. Ili havas po proksimume kvaronon de la nombro de investistoj. Gravaj estas ankaŭ Aŭstrio, Turkio, Francio kaj Usono. La proponataj servoj varias ekde bankoj kaj transporto ĝis komerco, konstruado, agrikulturo, instruado, hotelumado, turismo kaj telekomunikado. Industrioj estas i.a. laktaja, ŝua kaj tabaka. La investita kapitalo atingas 3649 milionojn da eŭroj.

Interese estas, ke plejparto de la kompanioj havas relative malgrandan nombron de dungitoj. La plej granda nombro (1000 laboristoj) apartenas al *Ferronikel* en Drenas. Sekvas entreprenoj kun 400 kaj 370 dungitoj. La ceteraj havas konsiderinde malpli da dungitoj, ofte eĉ ne dek.

Simpla proceduro igas alloga

Laŭ la leĝo pri registrado de kompanioj, la investantoj devas prezenti nur malmultajn dokumentojn: notarian kopion de la statuto de la kompanio, la decidon pri malfermo de la filio en Kosovo kaj la same notarian registran legitimilon. Monsumo de 20 eŭroj sufiĉas por registrado.

Senlaboreco restas ege granda

Malgraŭ la investoj la nivelo de malriĉeco en Kosovo restas alta. Laŭ neoficialaj donitaĵoj 45 % de la laborfortoj estas senlaboraj, dum laŭ oficialaj ciferoj estas nur 20 %.

Certe post la finiĝo de la procezo de censo de la loĝantaro, kiu okazis ĉi-princluste, estos pli fidindaj ciferoj.

Bardhyl Selimi



Ferronikel

Danĝera malamiko revenas

Ekde la 1980aj jaroj tuberkulozo marŝas laŭtakte kun aids, enirinte la 21an jarcenton kiel minaco por nia civilizacio. Tuberkulozo estas unu el plej antikvaj malsanoj de homoj. Postrestaĵoj ostaj de homoj vivintaj antaŭ 500 miloj da jaroj montras patologiajn ŝanĝojn karakterizajn por la tuberkulozo. Oni trovis la bacilajn (bakteriajn) kaŭzantojn de tuberkulozo en kelkaj egiptaj mumioj. La eminenta greka kuracisto Hipokrato konis la malsanon. Dum la industria revolucio de la 18a kaj 19a jarcentoj tuberkulozo intense disvastiĝis tra Eŭropo sekve de la alta popoldenseco, peza laboro, malhigienaj kondiĉoj en fabrikoj, malbona nutrado, malriĉeco. Tamen tuberkulozo traktis riĉulojn egale senkomplete. Multaj mondfamaj personoj pereis pro tuberkulozo, inter ili la filozofo Spinoza, la verkistoj Molière, Kafka, fratinoj Brontë, Ĉeĥov, Belinskij, la kom-

Tuberkulozo estas unu el plej antikvaj malsanoj de homoj. Postrestaĵoj ostaj de homoj vivintaj antaŭ 500 miloj da jaroj montras patologiajn ŝanĝojn karakterizajn por la tuberkulozo.

ponisto Chopin. Mortoj pro tuberkulozo fariĝis temo de multaj belartaj, ekzemple *La Traviata*, opero de Verdi.

Ĝis la apero de specifa terapio kontraŭ tuberkulozo la kuracistoj rekomendis al la malsanuloj specialan dieton, restadon en banlokoj de nigramaraj

aŭ mediteraneaj marbordaj regionoj ktp. Aliaj trovis pli da helpo en la altmontara klimato de Baden-Baden kaj aliaj lokoj. Bedaŭrinde, multaj ne sukcesis resaniĝi. Nuntempe tutmonde estas infektitaj de tuberkulozo pli ol du miliardoj da homoj, t.e. preskaŭ unu triono de la monda loĝantaro. La plimulto ne montras simptomojn de la malsano, tamen la brul- etantaj fokuso en la organismo povas ekflamiĝi, se la imuneco malfortiĝas. Ĉiujare en la mondo registriĝas de ok ĝis dek milionoj da novaj infektadoj, kaj pli ol du milionoj da homoj mortas pro tuberkulozo. La granda plimulto de la malsanuloj loĝas en malriĉaj landoj.


Gravaj malkovroj

En 1882 Robert Koch malkovris la mikroban kaŭzanton de tuberkulozo. Oni tiam nomis ĝin bacilo (bakterio) de Koch. Ĝi apartenas al la genro de mikobakterioj kaj nuntempe estas pli konata per la nomo tuberkuloza mikobakterio (*Mycobacterium tuberculosis*).

Tuberkulozo atakas precipe la pulmojn. Ĝi transmissiĝas ene de gutetoj eltusataj en la aeron, sed ankaŭ per infektitaj sputaĵoj, polvo ktp. En multaj kazoj ĝi cetere atencas la artikojn, cerbon, spinon, renojn, intestojn kaj haŭton. La bova tipo de la bacilo ofte infektas bestojn, tial ankaŭ la konsumado de laktaĵoj, viando ktp povas rezultigi infekton en homo.

En 1890 Koch faris filtraĵon de sterilizita kulturo de tuberkulozaj mikobakterioj, kiun li nomis tuberkulino. Kvankam ĝi ne estis taŭga por kuracado, tuberkulino eĉ nun estas uzata por la frua diagnozado de la malsano (ekzemple, enhaŭta alergia provo de Mantoux).

En 1895 Wilhelm Röntgen malkovris la tiel nomatajn X-radiojn aŭ rentgenra-



En 1882 Robert Koch malkovris la mikroban kaŭzanton de tuberkulozo. Oni tiam nomis ĝin bacilo (bakterio) de Koch.

diojn, kiujn ĝis nun oni sukcese uzadas por ĝusta kaj frua diagnozado de tuberkulozo.

Ekde 1921 por la profilaktiko (preventado) de tuberkulozo estas uzata la vakcino BCG, malkovrita de la francaj sciencistoj A. Calmette kaj C. Guérin (la nomo de la vakcino devenas de la komencaj literoj de la francaj vortoj *Bacille de Calmette et Guérin*). Pro ĝi malpliĝis la disvastiĝo de tuberkulozo, precipe inter infanoj.

En 1943 okazis epoka evento: la usona sciencisto Selman Waksman malkovris efikan kontraŭtuberkulozan kuracilon, la antibiotikon streptomicino. Per streptomicino eblas kuraci la plej gravan formon de tuberkulozo, tuberkulozan meningiton, kiu antaŭe ĉiam estis mortiga.

En la 1950aj jaroj aperis du pliaj efikaj medikamentoj: natria salo de para-

**Post aidoso
tuberkulozo
fariĝis la dua minaco
por la homaro.
Tiu problemo precipe
tuŝas multajn regionojn de
Afriko.**

aminosalikilata acido kaj la plej efika izoniazido. Kombinita terapio dum kelkaj monatoj rezultigis plenan resaniĝon de tuberkulozo en fruaj stadioj kaj, cetero, en malfruaj stadioj de la malsano preventis eligon de tuberkulozaj mikobakterioj fare de malsanuloj, tiel foriginte danĝeron por aliaj homoj. Tamen en la 1970aj jaroj en multaj kazoj la mikobakterioj fariĝis rezistemaj al tiuj medika-

mentoj. Tiam oni komencis vaste apliki aliajn efikajn kuracilojn: etambutolon, pirazinamidon, rifampinon (rifampicinon) kaj aliajn, kiujn oni uzadas ĝis nun. El la antaŭaj medikamentoj oni precipe uzas izoniazidon.

Aidoso kaj tuberkulozo

La ofensivo de aidoso en la 1980aj jaroj kondukis samtempe al la tutmonda eksplodo de tuberkulozo. Malboniĝis la situacio ne nur en la malriĉaj landoj, sed ankaŭ en disvolviĝintaj ŝtatoj, inkluzive de Usono. Tuberkulozo troviĝas inter la plej danĝeraj malsanoj, kiuj aperas dum la progresado de aidoso. Pli ol 50 % de la aidoso-malsanuloj samtempe malsanas je tuberkulozo. Pro detruo de la imuneco la antaŭe neaktivaj fokusoj de tuberkulozo en la organismo de aidoso-malsanulo ekaktiviĝas. Ĉe HIV-infektitoj la mikobakterioj pli rapide akiras rezistemon al kuraciloj, kaj pro tio necesas frua kaj longedaŭra kombinita terapio per tri-kvar medikamentoj. Tia rezistemo facile disvastiĝas ankaŭ inter personoj, kiuj ne infektiĝis je HIV. Tre gravas la frua kuracado de ĉiuj HIV-infektitoj per aktiva kontraŭvirusa terapio kaj medikamenta profilaktiko de tuberkulozo.

Konkludo

Post aidoso tuberkulozo fariĝis la dua minaco por la homaro. Tiu problemo precipe tuŝas multajn regionojn de Afriko. Tial oni kreis apartan fonduson kontraŭ aidoso, tuberkulozo kaj malario. La pligrandiĝinta rezistemo de tuberkulozaj mikobakterioj al multaj medikamentoj vekas grandan maltrankvilon. En pli ol 40 landoj jam estas registritaj stamoj rezistaj al ĉiuj medikamentoj. Certe, sciencistoj kreas kaj provas novajn kuracilojn. En 1998 estis deĉifrita la gena kodo de tuberkulozaj mikobakterioj, kio plifaciligos la kreadon de novaj efikaj medikamentoj. Necesas cetere plibonigi la vakcinon BCG kaj eltrovi novajn pli efikajn vakcinojn, kiujn eblos sendanĝere uzi por homoj kun difekta imuneco.

Vladimir Lemelev



En 1895 Wilhelm Röntgen malkovris la tiel nomatajn X-radiojn aŭ rentgenradiojn, kiujn ĝis nun oni sukcese uzadas por ĝusta kaj frua diagnozado de tuberkulozo.

ĈINIO

Ŝnurveturi

La torentaj akvoj de la rivero Salvino (Nugjiang) en la sud-okcidenta Ĉinio impetas en kanjono kun altaj krutaĵoj. En la rivera regiono cirkulas jena legendo: paro da gemantoj el la minoritato Lisu loĝis sur ambaŭ bordoj de la rivero. Ĉagrenite de la neeblo renkonti unu la alian kaj inspirite de la ĉielarko, ili streĉis ŝnuron kiel ponton super la rivero Salvino. De tiam tiu simpla trafikilo estas vaste uzata. Por ĝi oni bezonas pulion kaj rimenon.

La ŝnurveturo de bordo al bordo postulas kuraĝon. Oni konfidas sian vivon al la fortika ŝnuro kaj ĝuas desupre

la kanjonon, pendante en la aero. Estas aŭdebla la surdiga muĝo de la akvofluo sube. Oni nature sentas timon. Tamen, vidante kiel viroj kaj virinoj libere moviĝas, iufoje permane, tien kaj reen, oni ne povas reteni sian admiron pri ilia braveco.

Nuntempe super la rivero Salvino estas konstruataj ĉiam pli da pontoj, stile diversaj kaj forme respektindaj, tamen pontoŝnuroj plu ekzistas. Nun multaj uzas ilin ankaŭ kiel amuzan kaj sportan ilon. Turistoj venas eĉ el malproksimaj lokoj sperti la aventuron de ŝnurveturo super la muĝanta kaj furiozanta rivero.

MINOSUN



GENGSH

Kontribuojn por la rubriko Turismo de Monato kunlaborantoj sendu al turismo@monato.net.



MINOSUN

La torentaj akvoj de la rivero Salvino en la sud-okcidenta Ĉinio impetas en kanjono kun altaj krutaĵoj.

MONATO en Facebook

Kiu anas en la socia retservo *Facebook* povas senpage ricevi mallongajn informojn pri MONATO. Sufiĉas iri al la adreso eo-eo.facebook.com/revuo.Monato kaj alklaki supre la ligilon *Ŝati*. La mesaĝoj de MONATO ekde tiam aperos en via novaĵlisto.

Mikaelo Serveto (1511-1553) 500-jara

Mikaelo Serveto estis hispana teologo kaj fiziologo. Jam ekde frua aĝo li profundiĝis en la temon de la kristana dogmo pri Dio kiel Triunuo. Liaj studoj kondukis lin al la konvinko, ke la bibliajn donitaĵojn en la dogma historio oni ne sufiĉe atentis: li pledis por reiro al la „simpla kredo de la frua kristanismo”. Ĉe tio por li ankaŭ estis argumento, ke „reĝustigo” de kristanismo tiuterena povus montri vojon al interpacigo kun judismo kaj islamo, kiuj ambaŭ ja ege emfazas la unuecon de Dio. En la bibliaj tekstoj mem kaj ĉe la plej fruaj ekleziaj aŭtoroj la Triunoon oni ne trovas: ĝi formiĝis, laŭ li, el rezonadoj de tipe greka filozofio.¹

Serveto en 1531 publikigis sian konvinkon en la verko *De trinitatis erroribus* („Eraroj en la doktrino pri la Triunuo”), kiun en Bazelo la urbestro grandkvante igis neniigi. Romkatolikoj kaj protestantoj same kolere protestis. Serveto male provis klarigi siajn tezojn per *Dialogi de trinitate* („Dialogoj pri la Triunuo”), sed tio nur pliflamigis la diskutadon.

Kontraŭ la bapto

En 1536 la fama reformaciisto Johano Kalvino (1509-1564) en Ĝenevo aperigis latine sian *Institutio christiana religionis* („Instruo pri la kristana religio”), kiu fariĝis la baza teologio de kalvinismo. Serveto plu instruis, ke la doktrino pri la Triunuo kvazaŭ identas je la mitologia trikapa monstro Cerbero. Krome la bapton al infanoj, kiu estis preskaŭ ĉie akceptata kaj praktikata tra la kristana mondo – katolika kaj protestanta –, li konsideris kiel nepre kontraŭan al la instruoj de Jesuo mem. Nur la anabap-



tisma movado (nuntempe oni parolas pri Menonitoj) estis same kontraŭ la bapto de infanoj.²

Brulŝtiparo

Iasence la temo pri la Triunuo fariĝis persona kverelo inter pluraj gvidantaj teologoj. Jam en 1546 Kalvino diris en letero al amiko-teologo, ke neniam li lasus Serveto viva foriri. En 1553 aperis en Liono nova verko de Serveto, *Christianismi restitutio* („Reĝustigo de kristanismo”), kies titolo estis rekta atako kontraŭ Kalvino.³ En Liono unue kaptita, poste eskapinta el kaptiteco, Serveto iris al Ĝenevo, kie ĉe diservo oni rekonis lin kaj enkarcerigis. Kiel dirite, kaj katolikoj kaj protestantoj furioze kontraŭis lian instruon. Post proceso en Ĝenevo, li estis kiel herezulo kondamnita al la morto sur brulŝtiparo. Kalvino en la karcero ankoraŭ provis konvinki lin forlasi sian teologion – kio kompreneble ne efikis. La 25an de oktobro 1553 li estis viva

ŝtiparumita. En la nuna jaro en oktobro plurlande oni honore memoros pri li kiel martiro pri la konscienca libereco.

1. En siaj *Antaŭparoloj al la Nova Testamento* en 1516 Deziderio Erasmo jam emfazis, ke la sola novtestamenta teksto pri la Triunuo ne troviĝas en la origina greka teksto. En Esperanto tiu verkaĵo de Erasmo aperis en 2011 en traduko de Gerrit Berveling.

2. Serveto uzas por ĝi la belan terminon *pedobaptismo*.

3. La stilo de Serveto estas fojfoje tre atakema. Eta ekzemplo: sian „Reĝustigo de kristanismo” en paĝo 670 li finas post serio da 30 leteroj al Kalvino jene: „Kiu vere kredas, ke la Papo estas la Antikristo, tiu same kredos, ke la papisma Triunuo, la pedobaptismo kaj la ceteraj sakramentoj de papismo estas doktrinoj de demonoj. Ho Jesuo Kristo, filo de Dio, plej kompatema savanto, kiu tiel ofte liberigis vian popolon el premateco, liberigu nin kompatindajn homojn el tiu ĉi babilona ekzilo de la Antikristo, el ties hipokriteco, kaj el idolatrio. Amen.”

Gerrit Berveling



**Kontribuojn por la rubriko
Spirita vivo de Monato
kunlaborantoj sendu al
spirita_vivo@monato.net.**



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Fonto de beletro



Dum 26 jaroj la monata literatura revuo *Fonto* regalis siajn legantojn per literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj. Aperis en ĝi preskaŭ mil noveloj, pli ol du mil poemoj kaj multaj teatraĵoj kaj eseoj. Krom beletraĵoj aperis ankaŭ jen kaj jen recenzoj kaj aliaj artikoloj, rilataj al literaturo. Tiuj 26 jarkolektoj konsistigas do tre riĉan kaj diversskolan fonton de beletro.

La eldonanto de la revuo, la samnoma eldonejo *Fonto*, nun aperigis, en kunlaboro kun Esperanto-Asocio de Britio, komputilan DVD-diskon, kiu enhavas la tutan kolekton de la revuo *Fonto* (1980-2006) kiel JPEG-dosierojn: 312 numeroj, 11 812 paĝoj. Aro da HTML-dosieroj, legeblaj per iu ajn TTT-legilo, faciligas la aliron al la paĝobildoj. Estas aldonita ankaŭ alternativa prezento kiel PDF-dosieroj, kiuj eble taŭgas por iuj poŝlegiloj. La tekstoj estas perfekte skanitaj kaj bone legeblaj. La sola malavantaĝo de la disko: ne eblas serĉi difinitajn tekstojn aŭ vortojn ene de la revuoj. La PDF-dosieroj ja estas bildaj sed ne tekstaj.

pp

Fonto: Fonto, la beletra revuo. Eld. Esperanto-Asocio de Britio, Barlaston, 2010. DVD-disko. Prezo ĉe FEL: 12,70 eŭroj + afranko.

Klara kaj amuza haŝio

Mi uzis en la titolo la PIV-an vorteton „haŝio” por atentigi Ŝerpjo-sama, ke Esperanto havas terminon por indiki (japanajn kaj alilandajn) manĝobastonetojn. Mi ĵus legis la broŝureton *La japana lingvo kaj ĝia skribo* kaj legis ĝin per akraj okuloj, ĉar mi ja estas japanologo, kaj plie eĉ vivas kun japana edzino (mi opinias iom ĝena diri, ke mi „havas” edzinon).

Mi mem jam ofte spertis, kiel terure malfacile estas klarigi la japanan lingvon, kaj resumi ĉiujn nekredeblajn teruraĵojn en unu horo, kaj tiam ankoraŭ esperi, ke la aŭskultantoj komprenu pli ol duonon de via babilaĵo. Mi pensas, ke Cherpillod sukcesis. Kompreneble, estas diversaj eldiroj, pri kiuj oni povus diskuti, kiuj estas nur duone veraj ... sed estus torturaĵo detaligi ilin! En kelkaj lokoj, tamen, la aldono de nuancigo estus dezirinda. Cherpillod skribas, ke „la japana lingvo havas nenion komunan kun la ĉina” ... Pli bone estus: „la japana parollingvo ...”. Plie, li devus akcenti, ke li rigardas la aferon per okcidentaj okuloj, ĉar apliko de terminoj kiel *prezenco* kaj *preterito* estas diskutinda, kiel ankaŭ la rifuzo de futuro al la lingvo. Iuj lernolibroj vidas futuron, kaj ili minimume pravas tiom, kiom la prezenco-malkovremuloj. Se vi ne estas faka lingvisto, tiam forgesu miajn rimarkojn, kaj kreu senreziste la tekston de la broŝureto.

Petro Desmet'

André Cherpillod: *La japana lingvo kaj ĝia skribo.* Eld. la aŭtoro, Courgeard, 2009. 12 paĝoj, vinktita.

Lirika politika pamfleto



Anstataŭ la tutgloba varmiĝo en la 2010aj komenciĝas same tutgloba *mal*varmiĝo kaj nova glacia erao. Rezulte Eŭropo kaj Norda Ameriko fariĝis teritorioj maltaŭgaj por la normala vivo, kulturo tie sovaĝiĝis ĝis la vakera nivelo, kaj plejmulto fuĝis al pli taŭgaj regionoj, kie (en la suda Ĉinio kaj Brazilo) post 50 jaroj formiĝis novaj florantaj centroj de la civilizo. La rifuĝintoj spertas kutiman malestimon kaj malbonan traktadon flanke de la indiĝena loĝantaro ...

Tio estas la scienc-fikcia fono de la ĉarma novelo fare de la franca verkisto Jerome Leroy, brile tradukita de Armela LeQuint kaj Jak Le Puil. La ĝenro de la novelo, tamen, ne apartenas al pura kaj rigora scienca fikcio, ĉar ĝi entenas ankaŭ fortan mistikisman komponanton – misteran influon al la herooj de belaj kristalaj objektoj, iam produktitaj en Lilo (iama norda Francio), kaj fariĝintaj siaspeca simbolo de ĉio bona, kio estas

perdita en la senrevne forpasinta epoko – produktado de kristalo ja fariĝis forgesita arto.

La novelo estas verkita en lirika romantika etoso, estas leĝerstila kaj elvokas senton de profunda tristo. Samtempe ĝia tralego lasas certan senton de nefiniteco – eble, pro tio, ke ĝi estas sufiĉe malgranda, dum la problemoj tuŝataj en ĝi estas tre seriozaj, kaj pli detala prilaboro de ili povus kreskigi kaj profundigi la novelon ĝis nivelo de granda romano. La impresio, ke ĝi estas nur skizo de granda verko, aperas jam ĉe la komenco de legado kaj ne lasas onin ĝis la fino. Eble, tio estas granda avantaĝo de la verko, ĝuste al kiu la aŭtoro celis?

Malgraŭ la triste-lirika karaktero, la novelo estas esence politika satiro: ĝi malkaŝe primokas la mitan tutgloban varmiĝon promesitan de malhonestaj „sciencistoj” kaj politikistoj kaj montras la maljustan esencon de la nuna mondoordo per renverso de la interrilatoj inter la „sudaj” kaj „nordaj” popoloj – la lastaj eksentas neglekton kaj rasismon! Sed la du sencaj tavoloj de la verko – la lirika kaj pamfleta – neniel malhelpas unu al la alia, kaj eĉ trafe suplementas unu la alian! Ĝenerale, pro la brila lingvaĵo kaj bela enhavo la libro legindas por la plej postulema literatura frandulo, sed ĝin, pro malgranda amplekso, povas facile legi ankaŭ ĉiu homo, kiu timas dikajn volumojn kaj ankoraŭ hezite posedas la internacian lingvon.

Nikolao Gudskov

Jerome Leroy: *Songoj de kristalo*. Arko 2064. Eldona Fako Kooperativa de SAT, loko ne indikita, 2010. 87 paĝoj, broŝurita. ISBN 978-2-918053-05-7.

Prezo ĉe FEL: 5,49 eŭroj + afranko



Sen Rodin Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbendaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyí.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL:
24,00 € + afranko
(tradicia bindita versio),
14,40 € (ePub aŭ Mobipocket).


Inter videbleco kaj nevidebleco

La fontoj nevideblaj, la lastatempa poemaro de Baldur Ragnarsson, prezentas sur la antaŭa kovrilo tute videblan konkretan fonton, troviĝantan en reala itala strato, en unu el la plej vizitataj urboj de la mondo: la *Masko-Fontano*, sur la strato Giulia de Romo. Videbla, vidinda kaj delonge multevidata estas tiu roma fontano, kiu, tamen, havas ankaŭ allogajn nevideblajn aspektojn. Oni rigardas ĝin kun aparta emocio, kiam oni ekscias, ke ĝia renesanca strukturo inkluzivas antikvajn romianajn ŝtonajn maskon kaj kuvon. Kaj eble ĝia fascino kreskas, kiam oni ekscias, ke onidire antaŭ pli ol du jarcentoj oni fluiĝis vinon pere de ĝi, okaze de popolaj festoj.

Ĉio fluas

Mi sugestas, ke oni kontemplu tiun strangan virinecan maskon (verŝajne, envizaĝigintan la animon de la fonto, laŭ la pensmaniero de antikva skulptisto), imagante ĝin ankaŭ kiel alegorion de la universala fluo, laŭ la heraklita vizio pri „ĉio fluas”: ĝi povus signifi la fluon de tempo, de la vivo, de la penso, de la historio de la homaro ... kvazaŭ nevideblaj maskoj de nevideblaj fontoj kunekzistus kun la videbla ŝtona masko de la akvo-fontano. Kaj mi proponas tian manieron de kovrilkontemplado kiel startpunkton kaj metodon por la legado de la poemaro.

Meditadoj pri la rilato inter realo kaj la percepto de la realo aperas en multaj poemoj, ĉu kiel ĉefa temo, ĉu rande de ĝi. La poeto kontemplas pejzaĝojn, homojn, bestojn, aĵojn ktp en ties rilatoj kun siaj mensaj kaj animaj reagoj pri ili. La objektivaj kaj subjektivaj aspektoj de



tiaj kontempladoj fariĝas la videblaj kaj nevideblaj fontoj de liaj verkoj.

Hajkoj

En kelkaj poemoj aperas rektaj aŭ malrektaj aludoj al la fama hajko de Issa pri la roso. Onidire, la japana hajkomajstro Issa, kiu vivis antaŭ ĉirkaŭ du jarcentoj, verkis tiun hajkon tuj post la morto de sia infano. Jen tiu hajko laŭ la traduko de Ragnarsson: „Guto de roso/ estas guto de roso/ sed tamen, tamen”. Ragnarsson inkluzivigas tiun ĉi tradukon en la komencon de sia poemo *Mondo de roso*, samkiel la renesanca artisto inkluzivigis romianan maskon en la strukturon de pli malfrua fontano. Kaj komentas la nuntempa islanda poeto: „Rosaj perloj,/ rosaj larmoj/ pli valo-

ras/ pli gravas/ ol ideoj fabrikataj/ fuĝoj de naturaj faktoj/ sentebaj per okuloj/ per tuŝoj, per realaj ĉeestoj.// Mondo de roso/ estas nia sola mondo// mondo de patro/ mondo de patrino/ mondo de poeto.” Tie ĉi, samkiel tra la tuta poemokolekto, la profunda sento de universala fluo kaj ŝanĝo fariĝas nevidebla fonto de saĝa sereneco.

Nevideblaj eĥoj el tiu hajko de Issa sentiĝas en multaj aliaj poemoj, precipe kaj aparte en *Rozoj*. Tiun ĉi poemon Ragnarsson dediĉis al sia forpasinta filino Heiður, aŭtorino de infanlibroj en la islanda. Tie la „videbla” inspirfonto konsistas nur el la simplaj ruĝkrajonaj strekoj, kiujn la dujara filino faris antaŭ kvindek jaroj sur la fronta paĝo de *Alico en Mirlando*. Kaj jen kortuŝaj sugestoj pri la dolorigaj „nevideblaj” fontoj: „... Kaj la ruĝaj strekoj/ sur la Alico-libro kombiniĝas/ en mia koro kun la rozoj sur la paĝoj/ de ŝiaj libroj aventuraj, kaj la rozoj/ sur ŝia tombo, florantaj en somero.”

Inter la objektiva kaj subjektiva niveloj de mondkontemplado ofte ekzistas tensio, kiel en tiuj versoj el la hajkoserio *Postagmezo*: „Maljuna kato/ pasero sur la branĉo/ dormema gvato.” Kiam tiaspecaj tensioj okazas inter la realo kaj la arto, la situacio povas fariĝi fonto de konflikto inter la historia kaj la arteca veroj. Tiaj ĉi konfliktoj iĝas temoj de multaj filozofiaj poemoj, enhavantaj bongustan serenon humuron, kiel ekzemple *Pitagoro ebria*, *Pli ol patrinece*, *Bastonoj* ktp. En tiaj poemoj, samkiel en aliaj prihistoriaj aŭ priliteraturaj poemoj, la historiaj aŭ la beletraj herojoj de la libroj eniras en la intiman animan vivon de la poeto, kiu pasie dialogas kun ili,

**La historiaj, filozofiaj,
literaturaj kaj aŭtobiografiaj fontoj
de inspiro
kongruas kun la tradiciaj
kaj netradiciaj fontoj
de literatura esprimmaniero.**

samkiel li farus kun proksimaj amikoj aŭ najbaroj. Ekzemplo de tipa ragnarsona humuro estas la fino de la mensa filozofia „kverelo” inter li kaj la antikva poeto Solono, kiam Ragnarsson „... rezigne sekvas/ dignan Solonon, du uloj kun bastonoj/ sub dutempa suno, helena kaj islanda.” (citaĵo el *Bastonoj*.)

Fonto por la estonteco

Per la sama nuanco de humuro estas verkita la poemo *Pli ol patrinece*. Tie Ragnarsson tutkore indigniĝas kontraŭ la antikva „klaĉado” pri la supozata malamo inter la famaj antikvaj grekaj poetoj Korina kaj Pindaro. Laŭ Ragnarsson, ĉar la historian veron estas malfacile rekonstrui (fakte, eĉ la samtempo de la du poetoj estas pridubata de la nunaj historiistoj), ne indas rememori maldignajn onidirojn pri envio, vanteco kaj malamo inter du brilaj malsimilaj poetoj. Laŭ Ragnarsson, se la du poetoj entute vivis en la sama epoko, ili devintus admiri kaj kompletigi unu la alian, ĝuante siajn malsimilecojn, influante unu la alian diversmaniere, eĉ amante unu la alian ... Tiu ĉi belega mesaĝo pri verkista solidareco montras al ni gravan aspekton rilate la personecon de la islanda poeto, kiu ŝajnas optimisme konsideri la pasintecon kiel nevideblan fonton de lecionoj por la estonteco.

La ragnarsona poemo *La ofero de Lukrecio* estas poemo pri poemo. En ĝi aperas la latina poeto Lukrecio, alvokanta la diojn en sia filozofia poemego. La islanda poeto komentas tiun geston de Lukrecio, rilatigante ĝin al la fakto, ke, tamen, la ĝenerala filozofia pensmaniero de la latina aŭtoro estis tre mate-riisma. Tra la vortoj de Ragnarsson oni

sentas la saman humilan meditado pri la limoj de homa racio fronte al la misteroj de la mondo – la saman nevideblan ondon de serena saĝeco – kiu fluis iam tra la poemego de Lukrecio.

Fonto de timo, danko, miro kaj admiro

La dioj alvokataj de Lukrecio, samkiel la kristana Dio protektanta la vojaĝanton kontraŭ la ogrinoj en la poemo *Teruro*, samkiel la ogrinoj el la sama poemo, samkiel la elfetoj, kies okuloj brilas en la poemo *Roso*, samkiel la verda besto, kiun renkontas Temuĝin (Ĝingis Ĥano) en la poemo *Retorno de Temuĝin* – ĉiuj tiuj bildoj ŝajnas maskoj de unu sola nevidebla profunda fonto de la homaj timo, danko, miro kaj admiro fronte al la granda potenco en la universo (kiun oni povus nomi eventuale „Senkorpa Mistero”, se oni volus uzi la zamenhofan esprimon).

La historiaj, filozofiaj, literaturaj kaj aŭtobiografiaj fontoj de inspiro kongruas kun la tradiciaj kaj netradiciaj fontoj de literatura esprimmaniero. Troveblas en la libro poemoj kun aliteracio laŭ nord-eŭropa tradicio, tiuj kun regulaj strofoj ritmitaj kaj rimitaj laŭ la plej konata eŭropa tradicio, tiuj strukturitaj laŭ japana tradicio (hajkoj), multaj liberformaj poemoj kaj ankaŭ unu prozo-poemo. Ofte rekoneblaj estas eĥoj de la esperanta romantika poemtradicio. Tiaj influoj senteblas eĉ en cirkonstancoj, kiam Ragnarsson konscie asertas sian originalecon. Ekzemple en *La fontoj nevideblaj* (poemo aparte grava, ĉar la aŭtoro uzis ĝian titolon ankaŭ por la tuta kolekto), Ragnarsson klare esprimas sian distanciĝon de la amataj modeloj

de Kalocsay kaj Auld: „... Aliaj vojoj/ kondukis min al fontoj nevideblaj/ sub ŝtonamasoj de mia norda lando.”

Ofte Ragnarsson miksas malsimilajn tradiciojn laŭ surpriza maniero, brile uzante la buntajn eblojn de Esperanto. Jen, ekzemple, tiu humura fragmento el la poemo *Sopiro*, kie aliteracio estas uzata kune kun regula ritmo kaj rimo: „Tamen restas taŭga vojo de taktiko:/ Trudi penson en esprimon/ taktofirman kaj en rimon.” Jen alia ekzemplo el la hajko-serio *Posttagmezo*, kie ene de la japana formo de hajko troveblas rimo kaj aliteracio: „Flirta folio/ bloveto trans angulon/ apenaŭ plio.”

Priesperanta senluziigo

En kelkaj priesperantaj poemoj, oni sentas fortan ondon de melankolio, malgajeco kaj senluziigo. Temas pri senluziigo de granda revisto, kiu fojfoje opiniis, ke Esperanto rapide kaj mirakle plibonigos la tutan vivon de la planedo. Unu el la ekzemploj estas la poemo *Post tiom da jaroj*, dediĉita al la esperanta poeto Henri Vatré okaze de ties okdekjariĝo. Komparante la homajn destinojn kun vojaĝantaj ŝipoj, Ragnarsson finas la poemon tiel: „La rando nin atendas, ne haveno:/ falo duobla: de ŝipoj kaj kurteno.” Laŭ mia vidpunkto, la poemoj de Ragnarsson (inkluzive tiajn neoptimismajn dolorigajn ampoemojn pri la esperantaj lingvo kaj kulturo) estas tiom sinceraj kaj majstre kreitaj, ke ili kapablas stimuli la optimismon de la leganto rilate la vivpotencon de la kulturo, kiu naskis ilin.

Pro tiu ĉi kuraĝiga sento kaj pro la horoj de serena meditado, kiujn mi ŝuldas al la legado de la poemkolekto, mi dankas la aŭtoron. Mi deziras, ke li sentu, ke ne dezerta rando atendas liajn verkojn, sed gastamaj havenoj de malfermitaj koroj de legantoj.

Luiza Carol

Baldur Ragnarsson: *La fontoj nevideblaj*. Eld. Mondial, Novjorko, 2010. 127 paĝoj, bindita. ISBN 978-1-59569-174-3.

Prezo ĉe FEL: 9,90 eŭroj + afranko.



La Origino de Specioj

Karolo Darvino


Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afanko (papera versio),
14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

REAGO

Senmita biografio de Zamenhof (2)



Laŭ mia vidpunkto, la reago de Angelos Tsirimokos (MONATO 2010/4, p. 23) al mia recenzo de *Zamenhof. Biografia Skizo* ne plene pravas. Certe, povas esti, ke mi misinterpretis vortojn de la aŭtoro Aleksander Korĵenkov, kaj se tiel, do mi pardonpetas. Sed kelkparante Angelos Tsirimokos, verŝajne, parolas nur pri nesamaj vidpunktoj.

Pri la antaŭnomoj: sur p. 4 Korĵenkov skribis: „La nomoj Eliezer en la hebrea, Ludwik en la pola, Louis en la franca k.a. estas nacilingvaj formoj en la respektivaj lingvoj.” Mi multe cerbumis pri la celo de tiu komento, ĉar ankaŭ al mi Lazaro kaj Ludoviko ne ŝajnas du formoj de unusola nomo. Verŝajne, Aleksander Korĵenkov nur iom tro kurte sin esprimis. Sed kvankam la historio de la nomo Lazaro estas relative klara, la origino kaj

frua historio de la nomo Ludoviko estas tre neklaraj.

Pri la naskiĝatesto mi mem havas nenian rektan scion. Aleksander Korĵenkov simple diras sur p. 4: „Kiel Ruslanda civitano li estis nomata Lazarj Markoviĉ Zamenhof, kiu estas la sola oficiala nomformo”. Interesas, ke Aleksander Korĵenkov ne skribis la familian nomon „Samenhof”; pri la ŝanĝo de Samenhof al Zamenhof mi supozis, ke temis ne pri oficiala nomŝanĝo, sed nur pri ortografia afero, ĉar ne konata al mi estas la cirila skribformo de la nomo.

Ĉu ruso, ĉu polo? Dependas de onia vidpunkto. Laŭ mia propra sento, „polo” kaj „Pollando” estas politikaj vortoj. Kiu estis civitano de Ruslando, tiu estis ruso. Same kiel, kiu estas civitano de Britio, estas brito. La uzo kaj signifo de vortoj multe varias de epoko al epoko kaj de loko al loko. La vortoj „popolo”, „gento”, „nacio” havas nuntempe signifojn tre diversajn. Mi parolas kaj pensas laŭ la nuntempa signifo kaj uzado de tiaj vortoj laŭ mia propra sperto, kiu ja estas limigita al Usono kaj Aŭstralio. En sia *Skizo* Aleksander Korĵenkov nenie indikas, ke Zamenhof uzis la polan lingvon. Sur p. 6 estas skribite: „La hejma kaj lerneja lingvo de la juna Lazarj estis la rusa, kaj ĝi restis lia hejma lingvo dum la tuta vivo. Li revis fariĝi ruslingva poeto.”

Do, miavidpunkte, temas pri tre subjektivaj aferoj (escepte de la nomoj Lazaro kaj Ludoviko).

Donald Broadribb

Unu tago de iu persono

Ĉiuj homoj en la mondo estas laŭ sia dormmaniero aŭ „strigoj” aŭ „alaŭdoj”. Strigoj, kiel noktaj birdoj, malfrue ekdormas kaj malfrue vekigās, kontraŭe alaŭdoj ekdormas frue kaj same frue jam vekigās.

Mi apartenas ne al la strigoj. Mi ŝatas frue enlitiĝi. Kaj sufiĉe frue mi estas jam sendorma. Fakte mi tute ne povas kompreni tiujn personojn, kiuj nur iam ĉe tagmezo vekigās. Laŭ rekomendoj de medicinistoj ĉiu homo dum diurno devas dormi proksimume ok horojn. Mi eble estas ia specifa persono, kiu tute ne ŝatas aŭskulti, des malpli obei tiujn (aŭ similajn) medicinistajn rekomendojn, ankaŭ viziti ilin dum iaj malsaniĝoj. Sed tutegale mi kutime dormas ok horojn, eble iom malpli.

Menciindas ĉi tie ankaŭ, ke pluraj homoj, enlitiĝinte, ŝatas aŭ legi ĵurnalojn, librojn, aŭ spekti televidon. Mi povas fari nek tion, nek tion ĉi. Kutime, se mi jam estas en la lito, mi preskaŭ tuj ekdormas.

Je ĉirkaŭ la 4a matene, fojfoje eĉ pli frue, mi jam ne dormas. Iam okazas

ankaŭ tiel, ke mi vekigās jam je la 1a aŭ 2a nokte. Tiam mi provas ŝalti la televidilon kaj spekti iajn, kutime tute ne interesajn televidelsendojn. Multe pli ofte mi vekigās iam je la 4a aŭ 4a kaj duono. Sed tuj mi ne ellitiĝas. Mi ne scias ĝuste, sed pensas, ke ankaŭ aliaj homoj, se ili frue vekigās, multe cerbumas. Nokte mi (eble ne nur mi) havas ian nekutime streĉan pensmanieron. En la kapon venas diversaj ideoj, privivaj pensoj, eĉ fojfoje mi provis nokte versumi, kaj, kio estas interesa, verslinioj venas unu post la alia, kvazaŭ ĉe vera poeto (kio, kompreneble, mi ne estas). Trans la fenestroj (loĝas mi en la unua etaĝo) aŭdeblas bruoj de kortaj katoj kaj hundoj kaj de kortisto, kiu same frumatene komencas sian ĉiutagan laboron.

Se tamen mi ellitiĝas tuj vekiginte, mi strebas moviĝi tre atenteme, senbrue, ĉar aliokaze mi povas vekigi aliajn miajn hejmanojn, miajn familianojn. Post kutima lavado mi venas en la kuirejon, kie mi metas sur fornon teujon por varmigi akvon kaj prepari kafon. Mi ne scias pro kio, sed mi jam delonge alkutimiĝis


kafumi eĉ pli ol teumi. En mia jam malproksima juneco mi ege ŝatis teon, sed ne kafon, kaj trinkis ĝin sufiĉe multe. Kafumadi min alkutimigis mia patrino, kiu same antaŭe ŝatis teon, sed poste „transiris” al kafumado.

Do, ellitiĝinte, mi ne tuŝante la televidilon, ŝaltas la komputilon, rigardas, ĉu iu ankoraŭ memoras min, ĉu estas al mi leteroj, se jes, mi provas tuj aŭ preskaŭ tuj respondi, des pli se tiuj leteroj vere postulas rapidan respondon.

Mi ankaŭ rigardas aliajn aferojn en Interreto, ĉu estas iaj novaĵoj ĉe la landa Esperanto-movado, ĉe movadoj de niaj proksimaj kaj malproksimaj najbaroj, retpaĝojn de miaj amikoj kaj konatoj.

Ĉio ĉi postulas sufiĉan tempon, jam mateniĝas, kaj mi povas transiri al aliaj okupoj. Se estas ordinara labortago, ĉio pasas aŭtomate: frue mi elhejmiĝas, promenante tra stratoj, ne rapidante mi duonvojon perpiede, duonvojon uzante urban trafikon (plej ofte metropolitenon) atingas la laborejon.

Tamen, se estas ripoztago, ĝi pleniĝas alimaniere. Komence mi prenas liston



Mi ŝatas promeni, elektante por tio pli naturajn lokojn: parkojn, placojn, arbarojn, lokojn proksimajn al riveroj, abundajn je kreskaĵoj.



Kaj promeni mi povas ne nur somere, mi ŝatas promeni ankaŭ printempe kaj aŭtune. Nur ne tiom strebas mi promeni vintre.

kun taskoj por la tago: kion necesas aĉeti, kion prepari por la tag- kaj vespermanĝo. Mi vizitas bazarojn kaj aliajn vendejojn kaj aĉetas ĉion indikitan en la listo, ofte aldonante ion laŭ mia opinio bezonatan. Tio forprenas ne malpli ol du horojn. Kutime por ĉion bezonatan aĉeti sufiĉas unufoja vizito de vendejoj. Se aĉetaĵoj multas, mi iras aĉetadi du- aŭ eĉ tri-foje (tio okazas vere tre malofte).

Multe pli allogaj estas la postaj okupoj. Pli ĝuste tio ne estas okupoj, ĉar mi

ricevas veran plezuron. Mi ŝatas promeni, elektante por tio pli naturajn lokojn: parkojn, placojn, arbarojn, lokojn proksimajn al riveroj, abundajn je kreskaĵoj. Venante en urbajn parkojn, mi povas sidi ie sur benkoj kaj legi. Legado estas ankoraŭ mia kroma ŝatokupo. Samtempe kun legado mi observas preterirantajn ripozantojn.

Mi legas ajnajn librojn: kaj aventurajn romanojn, kaj detektivajn, kaj historiajn. Precipe lastatempe mi ekŝatis

ĝuste historiajn, eĉ ne sciante pro kio.

Kaj promeni mi povas ne nur some-re, mi ŝatas promeni ankaŭ printempe (la naturo vekigas post vintra dormado, verdiĝas arboj, aperas unuaj floroj) kaj aŭtune (siatempe tiun sezonon ege ŝatis Aleksandr Puŝkin, fama rusa poeto). Nur ne tiom strebas mi promeni vintre. Sufiĉe ofte nia vetero ne permesas ricevi de tio plezuron: frostas, ventas ...

Ne malofte mi promenas kun mia infano. Mi strebas, ke ankaŭ li ekamu la naturon.

Plej ofte mi vizitadas du el niaj urbaj parkoj. La unua estas la centra parko, eble la plej vasta el ĉiuj. Tie ĉiam abundas homoj kaj ĉiuj povas trovi por si ion interesan: allogaĵojn por infanoj, lokon, kie dezirantoj povas ŝakludi, sportplace-tojn, kinejojn. Ankaŭ la alia parko estas alloga, ĉefe pro tio, ke ĝi troviĝas relative proksime al mia loĝloko. Tie, krom la ceteraj allogaĵoj, estas ankaŭ zoologia ĝardeno, „kantanta” fontano (la unuan fojon tian fontanon mi vidis en Bulgario, kaj ĝi ege impresis min).

Jam malfrue vespere mi revenas hejmen kaj denove komencas okupiĝi pri ĉiutagaj hejmaj laboroj. Kaj finfine eĉ simpla spektado de televido ... ja ankaŭ ĝi estas ia okupiĝo.

Por mi ne fremdas ankaŭ mastrumado. Oni diras, ke viroj ne devas okupiĝi pri kuirejaj aferoj. Sed se la preparado de manĝaĵoj vere plezurigas min ... Se mi estas pli libera ol la edzino? Kial mi ne faru la virinan laboron? Mi entute ne ŝatas, se oni dividas ĉion en la viran kaj virinan.


Preparinte ĉion bezonatan kaj iom estinte ĉe televido, mi jam sentas, ke la okuloj poiomete komencas „fermiĝi”. Tio estas kvazaŭ signalo: „Ej, mastro! Ĉu ne tempas enlitiĝi?” Kaj kiel obeema persono, mi submetiĝas al tiu voko ...

Dmitrij Cibulevskij
Ukrainio

**Ĉu ankaŭ vi povas interese
priskribi ordinaran tagon
el via vivo?
Sendu ĝin al
moderna_vivo@monato.net.**



Plej ofte mi vizitadas du el niaj urbaj parkoj. La unua estas la centra parko, eble la plej vasta el ĉiuj. Tie ĉiam abundas homoj kaj ĉiuj povas trovi por si ion interesan...



Matena kafo

Akra vento kirlas laŭ Montgomery-strato; antaŭanoncante la vintron, iomete frostas. Kun unu mano en la poŝo – bedaŭrinde la alia tenas tekono – mi marŝas rapide laŭ la strato. Hodiaŭ la jako kaj kravato ne sufiĉas; vere mi bezonas mantelon. La altaj muroj de la komercaj konstruaĵoj ambaŭflankas la straton. Tiuj krutaj altaĵoj, simile al eskarpoj ĉe la oceano, faras profundan kanjonon en la koro de la financa kvartalo de San-Francisko. Ofte mez-tage mi admiris la variecon en la muroj: ŝtalo kaj vitro faras glatan, vertikalan ebenaĵon por la novaj; brikoj, betono kaj terakotaĵoj ornamaĵojn por la malnovaj. Ĉi-matene la altaj konstruaĵoj estas nur mornaj siluetoj en la matena krepusko.

Puŝmalfermite la pezan, vitran pordon, mi eniras la kafejon. Feliĉe trafas min brila varmeco kaj laodoro de kafo. Malgraŭ la frua horo la kafejo preskaŭ plenas. Obtuze murmuris multaj voĉoj. Mendante kafon, mi ĉirkaŭrigardas. Ĉe la tabloj geoficistoj babilas pri ĉiutagaj aferoj, politiko, aŭ oficejaj klaĉaĵoj. Pli ol kelkaj studadas siajn porteblajn komputilojn. Preninte mian kafon, mi serĉas sidlokon. Jen kontisto, jen boristo, kiun mi iomete konas, sed mi vidas nenium el mia oficejo, nek direktoron, nek administriston. Tro fruas por ili.

Finfine mi trovas tablon en fora angulo kaj sidiĝas. La kartona ujo, kiun mi nomas taso, ardas en mia mano kaj tre rapide mi ĝin metas sur la tablon. Mi

forprenas la kovrilon. Tro urĝe kaj senhezite, mi provas guston, kaj bruligetis miajn lipojn. Blovante sur la kafon, mi timas alian provon kaj komprenas, ke mi devas atendi. Feliĉe mi plektas miajn fridajn fingrojn ĉirkaŭ la varmegan tason. Kia vivo, mi pensas, kiam la matena kafo estas la plej alta pinto de la tago. Atendinte kelkajn minutojn, mi denove provas la kafon. Bongustas! Trinkante iom plu, mi pripensas la tagon antaŭ mi – mizeregan!

Dudek etaĝojn super la kafejo, en la sama konstruaĵo, situas la oficejo, kie mi deĵoras. Por mi estas nur kubejo, el longa vico de aliaj, kun skribtablo, komputilo, kaj bretoj plenaj de paperaĉoj kaj problemoj. La estro diris, ke hodiaŭ ni



devas fini la projekton. Ĉu eblas? Mi vere ne scias. Per ni la estro fakte diras *mi*. La helpantoj kaj komizoj estas tro junaj kaj senspertaj. Pri ĉiu detalo mi devas instrui kaj kontroli. La estro mem ne povas helpi. Li okupiĝas pri senĉesaj kunsidoj, kie li balbutas promesojn al la partneroj, kiujn mia teamo aŭ la cetero de la skipo ne povas plenumi. Kolere mi prenas trinketon de la vaporanta, nigra likvaĵo. La kolero kaj kafo vigligas min, sed je tiu momento mi tiel profundiĝas en mian koleron, ke mi ne tuj rimarkas la virinon.

Abrupte antaŭ mi staras virino, sufiĉe juna, svelta, kaj tre alloga, nete vestita en nigra jako kaj jupo, portante tekono. Eble ŝi estas tridekjara, sed al mi, kiu havas kvardek ses jarojn, kaj estas iom kalva, iom dika, ŝi ŝajnas tre juna. La jupo tre kurtas, la kruroj tre belas, kaj mi fajfe spiretas. Kiam ŝi forprenas dikan lanan koltukon, same nigran, montriĝas arĝenta bluzo el silka ŝtofo kun profunda dekolto. Ringo de perloj ĉe la kolo aldoniĝas. Ĝentile kun bela rideto, ŝi demandas, ĉu estas libera seĝo ĉe la tablo.

„Kompreneble”, mi balbutas, mal-lerte stariĝante en konfuzo. Svingante mian manon al tiu neokupita seĝo, mi raŭkas, „Bonvenon.”

„Vi tre afablas”, ŝi diras dolĉe, kaj surplankigante sian tekono, sidiĝas. „Vin mi volus danki, la ĉambro tiel plenas ...”

„Ne dankinde, estas mia plezuro”, mi entuziasmas. Mirante pri la bonsorto havi tian belan tablan kunulinon, mi frandas la momenton.

Ŝi metas sian kafon sur la tablon kaj rigardas min.

„Mi nomiĝas Johano”, mi tro abrupte anoncas kaj fuŝe etendas mian manon, kiel mallertulo. Vere kamparana knabaĉo, mi pensas poste. Surprizite, hezite, sed post momento, ŝi prenas mian manon dum sekundeto, sed tiu ago amuzas ŝin. „Vi estas tre formala.”

Ni ambaŭ ridas, sed mi hontas pri mia mallerteco, kaj penas senkulpigi min. „Tro da oficejaj kunsidoj, tro da klientoj, tro da renkontiĝoj ...”

„Ne bedaŭru”, ŝi ĝentilas per mola voĉo. „Mi sentas min preskaŭ tre grava pro tiu formaleco.”

„Kaj via nomo?” Mi denove tro abrupte demandas.

Ŝi ne tuj respondas, sed trinketas la kafon; ĝia varmeco ŝajne ne ĉagrenas ŝin. Sidante flanke sur la seĝo, kun unu kubuto sur la tablo, per gracia movo, ŝi metas unu belan femuron sur la alian kun delikata susureto, kaj rigardas min. Ŝiaj okuloj helbrunas - preskaŭ verdas. Mi tute enraviĝas.

„Kaj via nomo?” mi denove urĝas.

„Nomoj ne gravas; sen nomoj homoj pli misteras, ĉu ne?” Ŝia rideto malice mokas min, sed la voĉo tre allogas. Ŝi



ASTERN611



JEFEB333

vere ensorĉas.

„Sed mi esperas, ke ni amikiĝos”, mi plendas.

„Klaŭdia”, ŝi flustras. Denove ŝi longe rigardas min en silento, langvore gustumante la kafon. La belaj okuloj neniam palpebrumas kaj traboras min kiel kugloj.

Mi revas esti kun ŝi. Eble ni povus fari ion kune; eble ni lunĉus; certe lunĉo eblus. Post paŭzo, sentante min iom nervoza post tiu longa rigardado, mi klopodas rekomenci la konversacion.

„Iom malvarmas hodiaŭ”, mi diras.

„Tre”, ŝi diras per velura, kontralta voĉo.

„Kaj la vento”, mi feble daŭrigas.

„Jes, la vento.”

„Eble frua vintro”, mi komentas pensante, ke iam ni povus fari ion pli interesan ol lunĉi, eble pikniki en la parko,

kie ni povus marŝi manenmane sub la arboj.

Klaŭdia ne plu respondas, nur trinketas la kafon kaj rigardas min en silento. Ne sciante kion diri, mi trinketas kaj rigardas mian tason. Mi scias nenion pri ŝi. Kie ŝi laboras? Kial mi ne antaŭe vidis ŝin? Venante ĉi tien dum kelkaj jaroj, mi neniam vidis ŝin; certe ŝin mi memorus. Mia scivolo pezas kiel sako da ŝtonoj.

„Ĉu vi laboras proksime?”

Denove la fascinaj okuloj studas min. „Nur kelkajn stratojn for”, finfine Klaŭdia murmuris. Ŝi tenas la tason per ambaŭ manoj. „Ĉu tio gravas?”

„Probable ne”, mi konfesas. „Sed vi tiel belas, ke mi volus scii ĉion pri vi.” Mi ŝvitas iomete je tiu konfeso.

Ŝi rave ridadas per tiu sama velura voĉo. „Ĉion,” ŝi ripetas, „ĉiun mizeran

detalon.” Ankaŭ ridante ŝi diras, „Vi tre amuzas min, Johano.”

Mirante, mi konstatas, ke eĉ anĝeloj povas havi problemojn. Mi profunde revas pri ŝi, eble mi povus fari ion por helpi ŝin. En mia mensa sonĝo mi imagas, ke eble ŝi ŝatus min. Certe ŝi trovas min amuza.

„Vi estas kiel detektivo je la televido, farante multajn demandojn.” Ankoraŭ ridante, ŝi anoncas: „Nun mi pridemandos vin! Ĉu vi feliĉas?”

„Feliĉas? Mi vere ne scias.” Ŝi denove mokus min, sed mi sentas, ke ŝi volus diri ion plu.

Moviĝante antaŭen, metante ambaŭ kubutojn sur la tablon, Klaŭdia abrupte diras per forta flustro, „La vivo tre tedas, ĉu ne?”

Mi rektiĝas iomete sur mia seĝo. La subita ŝanĝo de temoj surprize frapas



min kiel bato per trabo. Ŝi tiel ĉarmas en mia imago, sed kion ŝi vere pensas? Finfine post paŭzo mi respondas: „Jes ja”, pensante pri tiu turmentejo dudek etaĝojn super mia kapo.

„Ĉu vi iam volus subite fari ion novan?” Klaŭdia kliniĝas antaŭen pli proksimen. Ŝiaj okuloj brilas. „Sen ia planado aŭ pripenso.” Ni sidas tiel intime, ke mi povas senti ŝian varman spiradon sur mia vizaĝo. Tre urĝe mi volus kisi ŝin. Ŝvitante je tiu penso, mi ne povas respondi.

„Venu kun mi, forgesu vian laboron, forgesu vian tedan vivon. Ni povus eskapi. Imagu, ke ni povus eskapi eĉ por unu tago. Imagu! Ni flugos libere kiel mevoj.”

Sentante, ke mi sufokiĝos, mi spiregas, „Sed mia laboro ...”

„Voku vian firmaon; diru ke vi malsanas. Mi farus same”, Klaŭdia intense urĝas, kaj tenas mian manon.

Mia koro batadas kiel kanario ĉe aperta pordo de la kaĝo. Ŝvitante, mi scias nur, ke pli ol ion ajn en la mondo mi volus iri kun ŝi. Preskaŭ dronante, mi stertoras: „Jes, mi iros!”

Feliĉe, ŝi tenere ĉirkaŭbrakas min,

kaj mi kisas ŝin.

„Klaŭdia, mi amas vin, kien ni iros?”

„Ni iros norden”, ŝi jam decidas. „Ni transiros la ponton ĉe la Ora-Portego, kaj iros vinejaren ie en Sonoma aŭ Mendicino. Ĉu vi havas aŭton?”

„Ne, ĉe la riparisto”, mi mensogas, sciante, ke je ĉi tiu horo mia edzino pretigos la infanojn kaj kondukos ilin al la lernejoj.

„Ne gravas,” Klaŭdia firme diras, „ni povos uzi la mian. Ĝi estas tute nova.” Mi miras pri ŝia kuraĝo kaj la detala scio. Ĉu ŝi jam faris tiun agon kun alia? La patoso de la momento tiel premas, ke mi ne povas ne veturi kun ŝi.

„Ni forflugos el ĉi tiu infero”, ŝi siblas kaj prenas sian poŝtelefonon kaj komencas puŝi butonojn.

Kion ŝi diris? Mi imagas la ŝoseon norden: blua strio transirus nigrajn arbarojn en la pluvo kaj nebulo; ni preterpasus vilaĝojn kaj urbetojn; la lumoj de la urbetoj briletus en fora distanco; zumus la radoj sur la pavimo, dum la mejloj glitus for. Klaŭdia tenere tenus mian brakon dum la veturo.

„Johano, ĉu vi feliĉas?”

„Jes, tre.” Ŝi metus sian kapon sur mian ŝultron. Mi kredas, ke ni ĉiam estus feliĉaj.

Kiam la virino ekstaras, mi elreviĝas. Ŝi kolere flustras al si mem, „Tro da demandoj.” Prenante la tekonojn, ŝi formarŝas; la altaj kalkanumoj frapas la plankon kiel pistolaj pafoj.

Glutante la ceteron de mia kafo, mizere mi rigardas la feĉojn ĉe la fundo de mia taso. La kafo gustas amare kaj malvarme. Kiel la vivo mem, mi pensas.

La belulino jam stariĝis kaj foriris el mia vivo, sennome, senparole, tute mistere, kiel fantoma sorĉistino, kaj mia vivo grize, senespere denove enuigas. Malrapide mi stariĝas, prenante mian tekonojn, forlasas la kafejon. Mi eniras la akceptejon de la konstruaĵo. Tiu salono estas grandega kun blankaj muroj, marmoraj kolonoj, multaj pentraĵoj de dikaj bankistoj, kaj gardista ĝiĉeto. Montrante mian legitimilon, mi preterpasas la gardiston kun afablaj salutoj kaj eniras la halon por liftoj.

Tie per suprenira lifto mi iras deĵorinfere.

Daniel L. Mason



anoncetoj

La kalendaro "La Jaro 2012" jam aperis kaj estas mendebla ekde nun ĉe MONATO, aŭ ĉe via kutima peranto. La prezojn vi trovas en p. 4, en la kadro "Tarifoj".

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Trevor Steele



**Flugi kun
kakatuoj**

Trevor Steele



**Flugi
kun
kakatuoj**

FEL

Estas la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento, kaj eŭropaj potencoj ŝajne nehaltigeble kolonias aliajn kontinentojn. En la brita kolonio Okcidenta Aŭstralio blankaj setlantoj ignoras la rajtojn de la aborigenoj, murdas aŭ forĉasas ilin de la tradicia teritorio, aŭ permesas al ili resti kaj servi kiel senpagajn laboristojn sur nove kreitaj bienoj.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 256 paĝoj,
ISBN: 978-90-77066-46-1; prezo ĉe FEL: 16,50 EUR + afranko.
Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 8,00 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be